

OMAGĜE AL Kálmán Kalocsay

El Abaújszántó ĝis Esperanta Parnaso

SESA VOLUMO

(rekonstituita sen bildoj)

ĈAPITRO 12

KALOCSAY LA REDAKTORO

12.1 Enkonduko

Kalocsay ankaŭ kiel redaktoro plenumis nemezureblan laboron. Kvankam nur en ok libroj oni legas, ke "Redaktis K. Kalocsay" kaj dekdu libroj anoncas, ke "Lingve reviziis K. Kalocsay", tamen multaj verkoj povas danki siajn delikatecon al li.

Krom *Literatura Mondo* li redaktis la *Bibliografia Gazeton* (1933), la kvaronjaran revuon *Lingvo-Libro* (1934-1938), estis redakciano ĉe *Hungara Heroldo* (1928-1932), lingva revizianto de *Hungara Vivo* (1961-1976).

La redaktora posteno portis al Kalocsay multe pli da laboro ol pri kio la Esperanta mondo sciiĝis. La severan redaktoron ofte trafis ankaŭ riproĉoj. La ĉefa celo de Kalocsay estis, ke la verkoj aperintaj sub lia redaktoreco estu gramatikaj kaj stilaj neriproĉeblaj. La konsilon de C. E. R. Bumy povas utiligi ne nur poeto-kandidatoj, sed ankaŭ prozistoj:

...

Do, gardu vin: frazisti barelbrue,
buntigi vian stilon kakatue.
Bombastojn tentajn streku for eksterme,
parolu simple, tamen trafe, kerne!²²⁸

...

*

228 En PGv: *La arto poetika* p. 75.

12.2 Lia redaktora metodo

Kiel redaktoro Kalocsay tralegis sennombrajn manuskriptojn. Li korektis ne nur la gramatikajn erarojn, sed nepardoneble ekstermis ankaŭ stilajn mallertaĵojn. Pri lia stilboniga metodo skribis H. Vatré:

"... Korekti, poluri, perfektigi estas la pasio de Kalocsay. La manuskriptoj, kiuj eliras el liaj manoj, similas al konfuzaj batalkampoj, sed batalkampoj sur kiuj li nepre venkis..."²²⁹

Respondante al la demando de László Halka, diris Kalocsay:

*Mi ĉiam klopodas kiel eble plej konservi la individuan stilon de la aŭtoro kaj mi korektas nur tion, kio ŝajnas al mi ne respondi al la lingva spirito.*²³⁰

Verŝajne la pli granda parto de la manuskriptoj, ne kontentigis lian postulon, ĉar en liaj postlasitaj paperoj apenaŭ troviĝas manuskriptoj, kiuj ne montras la cikatrojn kaŭzitaĵojn de la redaktora plumo.

Sándor Szathmári skribis:

"...Estis en 1938, kiam mi verkis *Kazohinion*. Literatura Mondo akceptis ĝin por eldoni, nur delegis Kalocsay-n por korekti mian tekston. Eĉ hodiaŭ mi gardas du paĝojn el mia tiama tajpaĵo. Pli ol duono de la teksto estas trastrekita kaj inter la vicoj troviĝas pli multa ruĝa manskribo ol la restintaj tajpaĵoj. Do rezulte: Mi verkis *Kazohinion* kaj Kalocsay skribis ĝin. Kaj kiom majstre! La senco neniam ŝanĝiĝis!"²³¹

Avoto (A. W. Thomson) rememorante pri Vallienne, riproĉis, ke Kalocsay siatempe traskribis la romanon ĈU LI? Jen:

"... En 1938, Literatura Mondo en Budapeŝto eldonis la unuan parton de tiu ĉi verko <stile reviziita> de Kalocsay. Sur la titolpaĝo ĝi estas erare nomita <La unua originala romano en Esperanto>. Sen ia malrespekto al la fama <reviziinto>, mi ne tute aprobas tian atencon de unu aŭtoro kontraŭ la laboro de alia. Mi ja scias, ke oni foje refaris arkaikajn verkojn en pli modernan lingvaĵon, sed en Esperanto eĉ la plej fruaj verkoj estas apenaŭ arkaikaj, estas pli interese eltrovi de ĉiu aŭtoro lian propran stilon... mi sugestas, ke oni reproduktu la verkon en ĝia originala formo."²³²

Lia stila plibonigo, la "nuanc-manio" ne unufoje kaŭzis konfliktojn kun la aŭtoroj. Leterkopio de Kalocsay informas nin pri unu el tiuj kolizioj:

Kara Amiko!

Mia letero kies tonon vi al mi riproĉas, laŭ mia opinio tute ne estis ofenda, ĝi estis simple mallonga kaj fakta, ĝi diris ĉion sen ĉirkaŭskribo. Nun mi volas vin trankviligi, pli vaste ekspliki mian opinion kaj klarigi mian sintenon.

Mi, kiel redaktanto de "Hungara Antologio" estis kompreneble plene responde pri ĝia enhavo, ankaŭ pri la tradukoj. Do se io al la kunlaboraĵoj ŝajnis al mi ne taŭga, mi havis antaŭ mi du vojojn:

1. simple rifuzi,
2. korekti aŭ tralabori.

Iri la unuan vojon malhelpis min (rilate al viaj verstradukoj) viaj ripetitaj kaj insistaj petoj, ke mi publikigu de vi kiel eble plej multe. Do mi devis iri la duan vojon. Kaj ĝin mi iris tiom pri sekure, ĉar vi ne nur ne protestis antaŭe kontraŭ tio, sed eĉ rekte petis de mi la tralaboron de kelkaj viaj tradukoj. Kaj dum la peto vi tute ne parolis pri tio, ke mi devas montri al vi antaŭe la ŝanĝojn. Tiun peton cetere mi tute ne estus akceptinta, ĉar inter miaj multaj laboroj mi tute ne estus havinta tempon por longaj leteroj, preparoloj kaj diskutoj. Kaj mi kredis, ke tia senkondiĉa peto signifas fidon ne nur al mia kompetento, sed ankaŭ al mia plej honesta kaj konscienca laboro. Mi kredis, ke vi rekonas, ke tiun rutinon, kiun mi akiris per mia vastega poezia praktiko, kompreneble ne povas egali via malpli longa kaj malpli vasta ekzercita poezia sperto. Ĉi tie ne temas pri talento, sed pri rutino, kiun akiri oni bezonas tempon kaj harditan sidkarnon. Mi do pretendas de vi rekonon nur pri poezia pasinto kaj pri sidkarno, tion, mi opinias, vi povas al mi doni sen granda ofendo de via sentemo.

Kaj mi malkaŝas al vi, ke antaŭlonge mi tradukis cent poemojn de Petőfi, sed ili ne povis aperi pro manko de eldonanto. Kaj nun mi vere tre ĝojas pri tio, ke ili ne aperis, ĉar mi vere hontus, se ili estus aperintaj en sia tiama formo: en HUNGARA ANTOLOGIO ili estas same, aŭ kelklfoje eĉ pli tralaboritaj, kiel viaj tradukoj. Cetere pri tiu honto mi memoras, ke mi diris al Bodó, kiam aperis via POEMARO EL HUNGARLANDO, ke vi foje hontos pri ĝi. Ĉi tiu diro esprimis ne nur kritikon pri la verko, sed ankaŭ fidon pri via talento, kiu, per sia evoluo, baldaŭ iros trans la nivelon de ĉi tiu junaĝa peko.

Pri viaj novaj tradukoj, faritaj por HA, mi devis konstati, ke ili estis faritaj improvize, senpacience, skize, en ili mankis la versefekto de la originalo, en ili estas gravaj pekoj kontraŭ la fideleco, ili tute ne sentigis la ĉarmon aŭ forton de la originala poemo. Ĉion ĉi mi ne atribuas al via sentalenteco, sed simple al la multaj zorgoj, kiujn vi havis tiutempe, kaj kiuj malebligis al vi senembarasan, zorgan, paciencan laboron, tiun dekfojan peson de ĉiu vorto kaj vortlokigo, tiun dekfojan forĵeton de rimo trovita, tiun elgustumon de la aromo de l' poemo kaj dekfojan novan mikson de nuancoj ĝis la trafo de l' sama aromo. Ĉion ĉi mi pensis kompensi kun la sama konscienco, kvazaŭ la traduko estus aperonta sub mia nomo.

Sed aliflanke, mi tamen konfesas, ke mi pekis. Mi estus devinta deklari: "Viaj poemtradukoj laŭ mia redaktora kaj neapelaciebla opinio ne taŭgas, kaj ne estas publikigotaj sen tralaboro, bonvolu do elekti inter rifuzo kaj tralaboro".

Nu, se vi insistas, mi povas al vi doni kontentigon en LM per la sekva deklaro:

"Mi konfesas laŭ la peto de amiko F. Szilágyi, ke en HA el la poemoj aperintaj sub lia nomo nur kvar (sekvos titoloj) estas nomeblaj liaj propraj tradukoj, ĉar en ili mi faris nur kelkajn malgravajn ŝanĝojn. La aliaj (sekvos titoloj) estas tiel plene tralaboritaj, ke mi ne povas kontesti la rajton de la aŭtoro, ke li ilin malkonfesu. Bonvolu do ilin rigardi kiel miajn tradukojn. Sed ĉi-okaze mi ŝuldas mencion kaj dankon al li pro kelkaj versoj, kiujn mi el liaj tradukoj transprenis. La transprenitaj versoj estas ne kontestebaj en tiuj tradukoj, kiuj aperis ankaŭ en lia POEMARO EL HUNGARLANDO... Aliflanke, mi volas honori la rajton de amiko, ke li malkonfesu la aŭtorecon de ŝanĝoj, kiujn li trovas nebonaj aŭ troaj".

Se vi trovas oportuna ion tian (tute amikan), bonvolu sendi viajn tekstojn, ĉar ilin mi ne konservis.

Kiel vi vidas, mi estas vere decema. Kvankam mi povus esti iom amara, sed tio estas mia subjektiva sento, kiu vin ne koncernas, ĉar vi ĝin ne komprenas.

*Amike kaj neniam plu fuŝe
K. Kalocsay²³³*

*Ps. Mi tre gojus, se vi ne insistus pri la publikigo de via "Blanka Birdo"(en LM).
Eble vi juĝos min malsaĝa — mi ĝin ne komprenas. Kaj kreu, ke nia legantaro
estas ankoraŭ pli malsaĝa ol mi.*

*

La deklaro — proponita de Kalocsay — ne aperis. La ofendiĝinta tradukinto verŝajne konsideris, ke tia deklaro certe ne utilis al sia renomo.

Kaj Kalocsay ne ŝanĝis sian redaktoran metodon, "fuŝis" plu la verkojn kaj klopodis altigi la nivelon de la Esperanto-stilo.

Ne unu el la aŭtoroj, kiuj tiutempe murmuris pro la Kalocsay-korektado, poste, kiam ilia verkista talento kaj rutino maturiĝis, komprenis, ke le iamaj verkoj vere bezonis la operacian intervenon. Pri tio konfesas ankaŭ F. Szilágyi:

"...Por io bela li emis oferi ĉion kaj ĉiun: eble li estus leginta kun ĝuo eĉ sian mortkondamnon, se oni estus verkinta tion en arta, literatura formo. Se ne, li estus nepre korektinta ĝin... Kalocsay korektis ĉion kaj ĉie kaj tiu maniero baŭmigis ankaŭ mian vanton. Mi ne sciis tiam, ke la korekto de Kalocsay estas distingo. Mi balbutis pri individuaj rajtoj de la aŭtoro ktp, kiel oni kutimas fari. Mia kontraŭstaro ĉesis iafoje, kiam Kalocsay deklaris kun ĝojradia mieno: <ĉi tie nenio estas ŝanĝenda>. Tiam mi komprenis, ke temas pri sincera volo simple kaj genie nature perfektigi ion laŭ la principo: 'du okulparoj vidas pli bone' (precipe se unu el ili apartenas al Kalocsay). Tute ne temas pri ia despotismo de genio. Kompreneble estus pli diplomata ĉiam interrilatiĝi kun la aŭtoro, sed li, kiu skribis en tuta vivo, horroras de la letterskribado kaj sekve aŭtoroj povis konstati nur, ke estas ŝanĝoj kelkfoje ampleksaj en iliaj verkoj..."²³⁴

H. Vatré skribas:

"... Kiam Bodó unuafoje atakis la *Cikoni-kalifon*, li ĝin verdire ne konkeris. La manuskripton li montris al Kalocsay, kiu notis en ĝi la malglataĵojn kaj konsilis plibonigojn. Nun post konsciencia revizio kaj longa penado, la juna tradukanto produktis la ĉefverkon, kiun ni konas."²³⁵

La polurado de manuskriptoj venintaj al la manoj de Kalocsay, ne sufiĉis satigi lian *lupapetiton*. Kion fari por kontentigi la ardan plibonigan pasion? Feliĉe la revuoj, libroj eĉ leteroj abunde liveris mallerte kunmetitajn frazojn, gramatikajn erarojn. Kalocsay reviziis ilin kun la sama zorgo kiel la aktualajn manuskriptojn. Ruĝkrajonaj signoj montras liajn "postajn korektadojn".

Kia utila lernolibro estus kunmeto el la manuskriptoj korektitaj de Kalocsay, ĉefe, se kompetentulo per notoj kompletigus ilin.

Kiam bezonis, la redaktoro
Kalocsay mem fabrikos eĉ
krucenigmon.

- 229 En: AD p. 114-115.
- 230 En: AD p. 39.
- 231 En: Paco 1966:151, p. 10.
- 232 En: NP 1957:3, p. 155.
- 233 Letero al F. Szilágyi. Mankas dato.
- 234 En: NLR 7. 1961:36, p. 214.
- 235 En: AD p.115.

12.2.1 Lingva revizianto ĉe Hungara Vivo

Ekde la naskiĝo de *Hungara Vivo* (1961) Kalocsay faris ĝian lingvan revizion ĝis sia morto.

Eble ŝajnas eksterordinare, ke la kontrolo de la manuskriptoj por li estis iam vere granda evento, ne ĉiutaga laboro, ne griza tasko. (Eble iom pli precize: la sankta pasio mem!)

Ĉar ni ambaŭ estis loĝantoj de Buda, mia aŭtobuslinio havas haltejon proksime de lia loĝejo (ĉe la strato Nyúl), do estis la plej konvena solvo, ke mi portis la manuskriptojn de la sekvonta numero de *Hungara Vivo* al li, al la lingva revizianto. Lingva revizianto — nur? En nia revuo rolis lia nomo, kiel faranto de "Lingva revizio", sed li povis fari nenion tiel simple.

Kiam mi transdonis la novajn artikolojn, novelojn, poemojn kaj tradukaĵojn, en tiu momento dronis ĉirkaŭ Kalocsay la tuta mondo. Kompreneble ankaŭ mi, kiu sidis antaŭ lia skribotablo. Unue li foliumis rapide la manuskriptojn, kaj poste li komencis legi iun aŭ alian verkon, kiu interesis lin pro ia ajn kialo. Ĉefe la diskutartikolojn, leterojn kaj originalajn kaj tradukitajn poemojn li legis kun interesiĝo.

Kaj eklaboris la plumo de la redaktoro laŭkutime indulgeme, sed ne tiel tiu de Kalocsay. Ĉar nia "lingva revizianto" ne kapablis tralegi iun manuskripton korektante nur la gramatikajn erarojn. Por li nek la stilo de iu skribaĵo, nek la enhavo, nivelo estis indiferenta. Li kontrolis eĉ la lastan folion tiel, ke sur ĝi troviĝis fine multaj korektaĵoj kaj mi ne povis sendi la manuskriptojn en la presejon, oni devis ilin retajpi. Kaj Kalocsay tajpis denove la korektitajn manuskriptojn kaj tiel li redonis la foliojn al mi.

Mi pensas, ke oni povas kompreni, kial estis ofenditaj plej multe da aŭtoroj. Jes, parte kaj laŭvorte ili estis dankemaj, sed aliparte en la animo ili restis ofenditaj. Ĉi tiuj fenomenoj: la granda, sankta pasio de Kalocsay kaj la ofendiĝo de novaj tradukistoj, kaj talentoj estis tre konataj por mi, ĉar ambaŭ estas homaj trajtoj.

Post unu jaro de mia redaktorado, kiam mi devis sperti ĉi tiun fenomenon kaj ties konsekvencojn, mi provis argumenti al li, ke li ne forgesu: Kolomano Kalocsay estas nur unu sola en Esperantujo, sed *Hungara Vivo* ne povas ekzisti sen aliaj verkistoj, tradukistoj, kaj ne povas aperi sen novaj kaj junaj literaturistoj. Tial ni redaktoroj devas esti iomete pli toleremaj, indulgemaj.

*

Jen lia letero kiel parolema ekzemplo de niaj diskutoj:

Kara Mihály! (Aperis en HV 1976:6, p.8).

Mi promesis, ke mi donas mian opinion pri la poemtradukoj de samideano Sz. en skribita formo. Nun jam mi pensas pri tio, ke "skripta manent", sed promeso estas sono — plenumo estas bono.

Bedaŭrinde, neniu el la tradukoj estas publikigebla, nek konservinda por estonta antologio. Mi ne kontestas, ke ili estas pri laŭdinda klopodado, eĉ, pri ioma rimtrafa sagaco: la malbono estas en tio, ke malfacilas rekoni en ili la originalajn poemojn. La originaloj estas poemoj tre bonaj, sed tiuj ĉi ne estas bonaj. Tio aparte koncernas la tradukojn el Attila József kaj Dezső Kosztolányi. Cetere tiuj, almenaŭ parte apartenas al la katagorio de la poemoj netradukeblaj. Ekzemple, la komenco de la poemo de A. József memorigas pri la

unua verso de (la tradiciiginta hungara traduko de) la protestanta psalmo "En vi mi fidis ekde la komenco"; la Kosztolányi-poemo rekte aludas la *Primortan Predikon*: "Vi vidas, homfratoj". Neniu traduko en iu ajn lingvo kapablas redoni tiujn aludnuancojn.

Kompreneble, tio ne ekskludas, ke la traduko estas akceptebla. Sed mankas el ĝi ne nur tiu nuanco.

En la poemo de Attila József oni sentas iun amaran atmosferon de 'diablo forportu ĉion!', sed ankaŭ ŝultroleva aroganteco, kiu estas frukto de malesperiĝo, kaj ĝuste ĝi donas la spicaĵojn de la poemo. El la traduko ĉio ĉi tamen komplete mankas. Mi ne povas analizi la tutan poemon, sufiĉas mencii la lastan version. La originalo tekstas laŭvorte: "Mi vivis, kaj pro vivo mortis jam ankaŭ aliaj" dum la traduko diras: "Mi vivis kaj la viv' finiĝas per morto". Ĉi lasta estas banala ĝeneralaĵo. Sed la originalo diras, ke por li — kaj tio jam okazis ankaŭ al aliaj — la vivo estas mortiga malsano. Do, ne la vivo finiĝas per morto, sed *li mortas pro la vivo*, kiel pro grava malsano. Granda diferenco! En tiu ĉi traduko la tradukinto klopodis trovi riĉajn rimojn, kaj li sukcesis en tio (*aferis-aperis, gerlenon-arlekenon, gazetojn-frazetojn*), sed, unue, tiuj rimoj forkondukas lin de la originala versteksto, due, ĝuste en tiu ĉi poemo A. József ne uzis riĉajn rimojn, eĉ, la lasta rimparo estas tute pala: "*leltár-halt már*" (evidente ankaŭ per tiu rimedo la poeto volis sentigi lacecon, rezignon).

Male en la poemo de Kosztolányi ne malhaveblas ĝuste la ludado per rimoj: la stranga efiko de la poemo fontas el la kontraŭdiro inter la morna enhavo kaj la parada verstekniko. Kaj la tradukinto ĉi tie aplikis multajn t. n. adasismojn, sufiksrimojn (*bonege-treege, moralaĵo-aĵo, rigidiĝante-relikviĝante, kemiaĵo-kreitaĵo*) — malgraŭ ke la esperantaj tradukistoj hontas peki tiaĵojn jam depost jardekoj — krome ankaŭ du tute surdajn asonancojn, kiujn esperantistoj tute ne aŭdas rimoj: *samaj-kunfalaj, malsamaj-saĝaj*.

Oni ne miskomprenu min, mi ne ironias. Temas pri du poemoj tre malfacile solveblaj: se la tradukinto malgraŭ siaj malmultaj praktikaj spertoj povis produkti solvon nur akcepteblan aŭ almenaŭ korekteblan, oni devus saluti lin kiel admirindan geniulon de la Esperanto-tradukarto. Estas mi, kiu pleje bedaŭras, ke tiu saluto maleblas.

Mi ne volus, ke prov-tentantoj de la tradukarto — aĝe aŭ esperantiste pli junaj ol mi — rigardu min kiel verspapon aŭ eĉ verslupon (mi aŭdis pri malpacemuloj, kiuj volonte konspirus por mia detronigo, sed ili apenaŭ sukcesos en tio, ĉar tronon entute mi ne havas, nur ĉ. 45-jaran tradukistan praktikon kaj ĉ. 50 000 tradukitajn versliniojn).

Se mi povas konsili ion al la komencantaj tradukistoj, tiu konsilo povas esti nur, ke ili ne kontentiĝu pri la solvoj tuj prezentiĝintaj, ili ne kontentiĝu pri la unua rimtrovo, sed ĉiam denove kaj denove ekzameni sian tradukaĵon, ĉu estas sufiĉe fidela al la originalo en sia atmosfero, senco, sonado, tono ktp. Eble la unuajn tradukojn ili tralaboras dek- aŭ dudekfoje. Poste ju pli multe da poemoj ili jam tradukis, des pli facile ĉio iros.

Kompreneble, ankaŭ necesas, ke oni konu la elementojn de la Esperanta versfarado. S-ano Sz. ekzemple kunrimigas la vortojn *spion'-kion*. Sed tiuj rimoj ne kunrimas, same, kiel ne kunrimas ekz. *amas* kaj *amas'*. Oni devas scii iomete ankaŭ pri la ritmo, sed tion mi ne povas detale trakti ĉi tie.

La tria poemo estas la plej facila: la diferenco inter la originalo kaj la traduko ĉi tie estas la malplej granda, sed bedaŭrinde, ankaŭ ĝi bezonas ne malmultan korektadon. Mi faris tion, tamen nur improvize; mi ne asertas, ke oni ne povus plu poluri ĝin. Cetere tiu ĉi poemo

ŝajnas taŭga por la venontjara unua numero, konsiderante la 25-an datrevenon de la liberiĝo de Hungario. Ĉar mi transprenis kelkajn rimojn el la traduko de Sz., mi ne volas subskribi ĝin kiel tradukinto.

Mi ĝojus, se s-ano Sz. ne vidus en tiu ĉi mia opinio superecan tradraŝadon, sed bonintencan helpon en sia tradukista kariero, por kiu subskribinto deziras al li multajn sukcesojn.

Kun amikaj salutoj

Kálmán Kalocsay

Budapeŝto, Aŭgusto de 1969.

*

Ĉu Kalocsay pravis? Kompreneble, kiu povis refuti lin? Sed la konsekvenco, la fakto estis por nia redakcio, ke nek s-ano Sz. nek kelkaj aliaj provantoj tradukis plu, sed forĵetis siajn emon kaj kuraĝon por la tradukarto.

Mihály GERGELY

(1980)

La revizianto Kalocsay
en 1971

12.3 Senekzemple aŭdaca entrepreno

"REFREŜIGITAJ FLOROJ". Tiel nomis Kalocsay tiujn poemojn de la unua periodo de la Esperanta literaturo, kiun li retuŝis, dotita ilin per poezia valoro.

La refreŝiga ideo de la forvelkintaj floroj koncipiĝis en la kapo de Kalocsay dum la antaŭprepera laboro de planita sed abortiĝinta nova FUNDAMENTA KRESTOMATIO.

Temis pri tio, ke la zamenhofa FUNDAMENTA KRESTOMATIO longatempe servis kiel modelo de la Esperanta stilo. Tamen de ĝia apero (1903) pasis multaj jaroj kaj dum tiu tempo la lingvo tiel riĉigis, evoluis, ke la unua fonto de la Esperanta stilo pli kaj pli fariĝis nur historia dokumento. Tial kelkaj pensis pri kompilo de NOVA KRESTOMATIO. La unua iniciato estis d-ro Emil Pfeffer, poste Salo Grenkamp-Kornfeld, sed iliaj provoj fiaskis. En 1934 Kalocsay kaj Pfeffer ree pritraktis la demandon. La bezonon de la NOVA KRESTOMATIO Kalocsay motivis jene:

... Ĝi montras al ni ankoraŭ komencan, primitivan stadion de la lingvo kaj literaturo: ĉe ĝia apero la literatura evoluo de nia lingvo ja apenaŭ komenciĝis; nur poste venis la internacia periodo en la historio de Esperanto, nur poste komencis ĉiuj popoloj vaste kontribui al la komuna lingvotrezoro. Jam en la dua eldono Zamenhof mem konstatas, ke ĉe la trarigardo de la unua eldono li trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al lia bonaj, sed kiuj nun al li ne plaĉas kaj kiujn li volonte ŝanĝus. Kaj vere, la Fundamenta Krestomatia lingve jam iom arkaigis, ĝi ne estas montrilo eĉ de la zamenhofa stilo (la plej gravaj verkoj de Zamenhof kreiĝis nur poste), des malpli ĝi reprezentas la nunan staton lingvan kaj literaturan...

... Oni povus opinii, ke la libro havos pli da lingvohistoria valoro, se oni represas ĉion senŝanĝe, ĉar tiamaniere ĝi respegulos ankaŭ la evoluon de la lingvo. Sed oni devas pripensi, ke, unue; malglataĵoj, mallertaĵoj, eraroj kaj stumbloj lingvaj tre ofta devenas ne el la senevolueco de la tiama lingvo, sed el la senevolueco de la aŭtoro; due, ke tiu Krestomatia devas servi ankaŭ kiel instruilo de stilo, do lingve ĝi devas esti modela. Tial kun granda takto kaj singardo, ni ne hezitis ekstermi el la tekstoj ĉion, kio al ni ŝajnis ne konforma al la spirito de la lingvo. Ankaŭ en la poemoj ni faris kelkloke ŝanĝetojn, teknikajn mallertaĵojn ni klopodis elimini, konfuzajn frazojn pliklarigi. Per tio ni sukcesis savi kelkajn poemojn kun bela kerno, kiujn ni estus devintaj ellasi pro nepardoneblaj pekoj. Se iu protestus kontraŭ tiu agmaniero, li pripensu, ke; unue, Zamenhof mem korektis ĉion ne propran en la Fundamenta Krestomatia, ni do sekvas nur lian ekzemplon; due, ĉe kelkaj Esp-aj gazetoj la redaktoroj kutime korektis ĉiun ensenditan artikolon, ni do kompensas nur la taskon de tiuj redaktoroj, kiuj tion, ĉe aliaj gazetoj ne faris...²³⁶

* * *

E. Pfeffer ellaboris detalan planon kaj amasigis interesan kaj valoran materialon. La tasko de Kalocsay estis kompletigi la kolekton de Pfeffer kaj stile revizii la materialon.

La KAL-ĈI Dokumentaro gardas grizkoloran dosieron, kiu enhavas la iam kolektitajn poemojn por la NOVA KRESTOMATIO.²³⁷ La manuskriptoj montras la modifan agadon de Kalocsay. Inter la poluritaj pecoj troviĝas poemoj de M. Hankel, A. Kofman, S. Karolczyk, Leo Belmont, E. Miĥalski, V. Eroŝenko, S. Schulhof, ktp.

Pri la poemtralabora entrepreno de Kalocsay malmultaj sciiĝis (ĝenerale nur la nemultnombra legantaro de LM), krome: neniu konis la ŝanĝojn. Do la polurigo vekis nek grandan eĥon, nek proteston. Ties tempo venis nur poste.

*

En la kvindekaj jaroj Kalocsay decidis transsavi el la arkivo en la vivon la poemojn tralaboritajn por la NOVA KRESTOMATIO, kiun — kiel li diris — "la vento ĝin forportis". Pri ĉi tiu intenco informas nin leterkopio de Kalocsay adresita al Isaj Dratwer:

*... Mi havas la intencon fari antologieton el la malnova, precipe naskiĝinta antaŭ 1914 Esp-
a poezio. Do mi estus tre danka al vi, se vi sendus al mi poemojn nepublikitajn de S.
Braŭn, kaj poemojn de vi mem. En tiu antologio mi metus poemojn de Leo Belmont,
Kofman, Kozlowski, Braun, vi, Schulhof, Clarence Bicknell, Edmond Privat, Jan van
Schoor, Eroŝenko, Ito saburo, Inglada, Mangada-Rosenörn, Grau-Casas, Domĉnech-i-
Mas, K. Myslik, ktp...*²³⁸

Kun la sama peto turnis sin Kalocsay al la rusa A. Logvin.

Kara Amiko.

*Ĵus mi ricevis de Régulo vian volumon "Sur la vivovojo" kaj mi volas vin kore gratuli: la
libreto aspektas tre bele... Relegante vian volumeton, mi ree kaj ree trafis en via poemo pri
Valdemar Sutkovoĵ. Vi nomas lin fama sovetia esperantisto, sed bedaŭrinde, la
esperantista mondo scias pri li tre malmulton. Nun mia peto estas, ĉu ne povus vi iel akiri
Sutkovajn poemojn kaj ilin al mi sendi? Mi preparas nome esearon pri malnovaj
esperantistaj-poetoj kaj tre volonte mi skribus ion ankaŭ pri Sutkovoĵ, se mi havus por tio
materialon, t.e. indikojn pri lia vivofluo kaj ankoraŭ kelkaj poemojn de li. Mi estus tre ĝoja
kaj danka, se vi povus al mi havigi tiajn, aŭ povus almenaŭ diri, de kie kaj de kiu mi povus
tiajn ricevi...*²³⁹

*

En la paĝoj de *Norda Prismo* Kalocsay komencis revivigi la poemojn el literatura vidpunkto ĝis tiam ne vivkapablajn.

Sub titolo *Variantoj pri la temaro de Marie Hankel* li interpretis ses poemojn de la poetino kaj klarigis la bezonon de la polurigo:

*... En la "heroaj tempoj" de Esperanto regis tia animstato inter la samideanoj, kiu
nerevenigeble forpasis, sed kies arta prezento certe estas tre interesa por la hodiaŭaj
esperantistoj. Se ni do trovas tiajn poemojn, el kiuj alspiras nin tiuj tempoj kun la naiva
ĉarmo de la sankta simpla, ni devas tiujn gardi... Tamen laŭ arta ellaboro, bedaŭrinde, tiuj
pecoj estas ne nur ne valoraj, sed rekte ne akcepteblaj. Kaj ĉe ili ne temas pri arkaikeco,
eksmodeco de la lingvaĵo, kiel en la naciaj malnovaj literaturoj, sed simple pri manko de
lerto, de rutino, de poezio-preteco...*²⁴⁰

La poemon de Marie Hankel: *Post la unua kongreso* retuŝis Kalocsay dufoje, plibonigis paralele kun la evoluo de la verstekniko kaj kun la maturiĝo de sia poeta rutino. Li poluris unuafoje por la planita NOVA KRESTOMATIO (1937) duafoje por la planita kaj same ne realiĝinta antologio REFREŜIGITAJ FLOROJ (1958).

POST LA UNUA KONGRESO

La unua retuŝo²⁴¹

POST LA UNUA KONGRESO

*Post via hejmenven' vi rakontis en
entuziasmo:
Ho, traviva] de Bulonj'! Kompreni, paroli
ni povis,
Kaj la amatajn vortojn aŭdi de buŝo de
fratoj,
Ŝajnis, vere, reveni miraklo de Pentekosto!
Kaj dum via rakont' mi rimarkis lumi
flameton
Sur via kap' kaj vidis brili vizaĝon, okulojn.
Ree fidante, mi kredas nun je miraklo,
je signoj.*

La dua polurigo²⁴²

Post Marie Hankel *Stanislaw Braun*, la *droninta poeto* estis la dua "vekigita" poeto.²⁴³

Sekvis la *Revivigo de Czeslaw Kozlowski*.²⁴⁴

La poempolurojn Kalocsay faris ne sen hezito. Pri tio oni legas lian rimarkon:

*... En la NP (1958.4) mi prezentis al la afablaj legantoj de la revuo iom el tiu poezia rikolto: ses poemojn de Marie Hankel. Mi konfesas, ke ne tute sen timo mi entreprenis ilian "tradukon" — io tia ja estas tute senekzempla. Mi mem miris, ke de tiam nenia insulto min trafis pro tiu atenco. Tamen ĵus trarigardinte la Antologion de Auld, mi konstatas, ke tiu min plene pravigas. Efektive, la Antologio nenio enhavas de Hankel, kaj tio min plifirmigas en mia opinio, ke, se oni estas malpli aŭdaca ol mi, oni devas ellasi tiun honorindan poedinon el la trezorejo de nia poezio. Male, mi kredas, ke aŭdaco kiel la mia ebligas gardi ŝian nomon inter tiuj de niaj fruaj poetoj kaj dokumenti tion ankaŭ per poemoj.*²⁴⁵

*

Prokrastita ne estas forĵetita.

El la plumo de Adolf Sproeck alvenis la unua riproĉo kontraŭ la "refreŝiga" entrepreno de Kalocsay.

"...Jen Kalocsay en n-ro 1-a de Norda Prismo sekcas la poemojn de Marie Hankel. Tion, per kio ŝi disradias el koro superfluante da entuziasmo sian amon al Esperanto, al la interfratiga ideo de komuna lingvo, li sekcas, dishakas, poste ree kunmetas laŭ siaj ideoj kaj krias: Jen, tiel la poemo devas aspekti — mi Kalocsay donis al ĝi veran, unikan sole indan formon. Herezulo!

En alia n-ro de NP Kalocsay havas novan viktimon. Estas iu Kozlowski, pri kiu mi neniam legis aŭ aŭdis. Sendube K. estas pli lerta versfaristo ol Hankel aŭ Kozlowski. Sed li bonvolu deteni sin de <plibonigoj>... lasu ilin, kiaj estas. Ili estas, simptomoj de certa epoko... jam pasinta. Ili restu, kiel ili estas. Ŝanĝo aŭ plibonigo estas herezo."²⁴⁶

*

Kalocsay daŭrigis la eseon-serion kaj la poem-tralaboron.

Sekvis: *Jan van Schoor*, la *grandurba paŝtisto*.²⁴⁷

Sub titolo *La poemmalŝata poeto* li prezentas la poeziaĵon de I. U. (t. e. Ito saburo).

Enkonduke la eseon Kalocsay diskutas la opinion de A. Sproeck:

... li rekonas — dankon! — ke mi estas "pli lerta versfaristo" ol Hankel aŭ Kozlowski. Sed, se tiel estas, kial li domaĝas al tiuj ĉi poetoj, ke ilia postlasaĵo havu utilon el mia versfara lerto? Li skribas, ke li neniam legis aŭ aŭdis pri Kozlowski — nun, li povis de li legi poemojn ĝueblajn. Al kiu malutilas tio? Ĉu mi ofendis eble la renomon de Kozlowski, kiu, nekonata, havis jam nek renomon, nek eĉ nomon? Kaj ĉu lia renomo estus pli granda, se liaj poemoj estus malpli ĝueblaj?...

"Ili restu, kiel ili estas", li insistas. Tio signifas: ili mortis, ili restu mortintaj. Mi, miavice, volas revivigi tiujn poetojn kaj serĉi eĉ la eblojn, kiel ion el ili teni viva. Ŝajnas, ke mi pli amas ilin, ol sdo Sproeck, ilia defendanto... Li povus diri eĉ, se li volus esti malica, ke jen, al la maljuna K. K. jam elĉerpiĝis la ideoj propraj, restis nur la versrutino, kaj nun li ludadas per ĉi-lasta super la ideoj de aliaj. Responde je tio, mi povus nur diri (aŭ balbuti): Tamen, al kiu malutilas tio?²⁴⁸

En la galerio sekvis *Leo Belmont, la gaja profeto*.²⁴⁹

Post longa paŭzo aperis en la serio la lasta poet-portreto: *Clarence Bicknell*.²⁵⁰

236 En: Lingvo-Libro 1938:1, p. 1-2.

237 Kalocsay zorge gardis la poezian parton de la kolekto kune kun la anekdotoj, kiuj venis al liaj manoj. Sed kio estas la sorto de tiuj prozaj verkoj, kiujn kolektis E. Pfeffer?

238 Letero al I. Dratwer. Mankas dato.

239 Letero al A. Logvin, datumita 1965.IV.12.

240 En: Norda Prismo 1958: 4, p. 213-217.

241 Represo el Lingvo Internacia 1908.

242 En: Norda Prismo 1958:4, p. 214.

243 En: Norda Prismo 1959:2, p. 76-78.

244 En: Norda Prismo 1959:3, p.120-125.

245 En: Norda Prismo 1959:3, p. 120.

246 En: Norda Prismo 1959:5, p. 210.

247 En: Norda Prismo 1959:5, p. 211-214.

248 En: Norda Prismo 1960:3, p. 81-85. La eseon okaze de la unua morto-datreveno de I. U. (1970) oni aperigis en aparta broŝureto en la Japana kaj Esperanta lingvoj.

249. En: Norda Prismo 1960.:4, p.110-112; 1960:5-6 p. 62-163.

250 En: Norda Prismo 1966:3, p.168-171.

12.4 Pri la poem-tralaboro de Kalocsay

Unuj observas la demandon ĉefe el etikaj vidpunktoj. Ili opinias, ke la samtempuloj de Kalocsay havas eblon konsenti, aŭ rifuzi la polurigon, sed la forpasintaj verkistoj el la tombo ne povas protesti kontraŭ la redaktora plumo, sekve ili bezonas defendon. Aliaj observas la demandon el literatura stil-historio vidpunkto.

12.4.1 Pri la polurita VESPERKANTO de H. Adamson

W. Auld skribas:

"... Hendrik Adamson, poeto de la estona lingvo kaj Esperanto, jam postmorte donis al ni la verkon *Vesperkanto* (1967) ... Vere bedaŭrinde lia editoro, D-ro Kalocsay, ne povis bridisian konatan jukon reviziadi la poemojn de mortintaj poetoj, kaj tio, kion ni ricevis, jam ne estas la reala Adamson, kiel ĝi ankaŭ estas tiu Adamson, kies verkoj siatempe aperis en *Dekdu poetoj* kaj diversaj revuoj."²⁵¹

Argumento de R. Rossetti:

"...li ankaŭ arbitre ŝanĝis poemojn de aliaj, rompante foje ilian karakterizan tembron. Sufiĉe kompari <La amatoj de l' stelo> de Emba en *En ekzilo*, 1938, kaj en la postmorta *Ekzilo kaj azilo*, 1962. Ke kulpis tion ĝuste Kolomano, kiu en *Eterna bukedo* interpretis plej diversajn voĉojn, estas apenaŭ kredebla. Kiam mi plendis, ke en *Vesperkanto* (1967) de Hendrik Adamson li grave ŝanĝis plurajn pecojn, eĉ donante al la aŭtoro la neologismon 'svaga', kreitan 20 jarojn post lia morto, Kalocsay respondis, ke ankaŭ la fruajn versojn de Adamson li reverkis por *Dekdu poetoj* (1934), ĉar ili estis 'nekredeble primitivaj, sed ili havis kelkajn bonajn ideojn'! Do jen el la nepoeto li fabrikis poeton, kaj la brava estono iris kun falsita pasporto en la Esperantan Panteonon ..."²⁵²

12.4.1.1 Defende al Hendrik Adamson

Hilda Dresen, Jaan Ojalo, Henrik Seppik reagis al la artikolo de R. Rossetti:

"... Nin, estonajn esperantistojn, ege ĝenas la lasta frazo de R. Rossetti, ĉar ĝi sonas kiel mortoverdikto al la poeto H. Adamson, anoncita 30 jarojn post lia fizika morto. Kvankam — verŝajne — temas pri iuj hazardaj kaj nepripensitaj vortoj de K. K. (kio ne videbligas el la deklaro de R. R.), ni komparis la versaĵojn aperigitajn en *Dekdu poetoj* kun la manuskriptoj de H. A., troviĝantaj en la literatura muzeo en Tartu, kopiitaj far ni ... *Vesperkanto* "polurita" kaj parte reverkita far K. K., prezentas nur proksimume duonon de la tuta poezia verkaĵo de H. A. en pli moderna, pli perfekta vesto. H. A. estis kaj restas estona kaj Esperanta poeto certe ankaŭ sen la <polurado> kaj reverkado far K. K., kompreneble — poeto de sia epoko. Per tio ni ne volas subtaksi la talenton kaj rolon de K. K. en la Esperanta literaturo. La aserto, ke K. K.<el nepoeto fabrikis poeton> kaj irigis H. A. <kun falsita pasporto en la Esperantan Panteonon> estas ne pripensita arogantaĵo, ne depende de tio, ĉu de K. K., ĉu de R. R., aŭ de ili ambaŭ."²⁵³

251 En: HdE 1971:8. (1507), p.1.

252 En: Esperanto 1978/135.

253 En: Esperanto 1979/8-9.

12.4.1.2 Ankoraŭfoje pri la "Vesperkanto" de H. Adamson.

Post la morto de la poeto ni revis pri eldono de liaj verkoj. J. Ojalo ame kolektis la materialon kaj <eldonis> la versaĵojn en tajpita, ilustrita volumo. Por sondi la eldoneblecon, unu ekzemplero estis en 1966 transdonita al J. Régulo, kiu afable promesis pripensi la aferon. La postan malfeliĉon kaŭzis, ke la transdonita volumo enhavis ankaŭ la versprovaĵojn de Adamson, verkitajn en la unua jaro de lia esperantistiĝo. Ili troviĝas en la komenco de la menciita volumo, ili ne havas titolojn — estas nur numeritaj (ĉ. 20 versaĵoj, kelkaj sufiĉe longaj). Oni opiniis, ke por enlandanoj estos interesa konatiĝi kun la tuta postrestinta materialo, ke ĝi ne kuŝu en la arkivo. Do la vortoj de Kalocsay pri la primitiveco povas rilati nur al tiuj versprovaĵoj, ĉar la versaĵoj, kiuj ekde 1932 aperis en LM, estas tre malmulte korektitaj kaj ankaŭ en *Dekdu poetoj* oni ne rimarkas gravajn ŝanĝojn. Mi devas noti, ke ĉe la studado de Esperanto helpis la poeton de la sekretario de Esperanto-Asocio, Helmi Dresen. Ŝi atentigis lin pri lingvaj malglataĵoj, kiujn ŝi trovis en liaj freŝe verkitaj versaĵoj. Li prilaboris ilin, poste ili estis tajpitaj, kaj el tiu materialo oni sendis versaĵojn al LM, kiu favore akceptis. La ne prilaborita parto restis en manuskripto.

Ni do ĉefe volis kompetentajn konsilojn por la elekto de versaĵoj. Oni ja antaŭvidis eldonon de lia prozo kaj poezio. Por faciligi la elekton, mi eĉ notis versaĵojn, kiuj al mi ŝajnis malpli rekomenditaj. En decembro 1966 Kalocsay sciigis min per letere:

"Mi jam skribis al Régulo, ke li sendu al mi la poemojn de H. Adamson. Ni, kun L. Tárkony, trarigardos kaj, se necese, iom poluris ilin, kiel decas al <polurita romantisto> (Laŭ Auld)."

Kompreneble, ricevinte la materialon, Kalocsay unuavice interesiĝis pri la <primitiva materialo, sed enhavanta bonajn ideojn>. Tiam alvenis letero, en kiu Kalocsay skribis:

"Mi multe klopodis pri la Adamsona-volumo; vere sendankema klopodo, donanta nenian gloron. Tamen la ĉefaĵo estas, ke Esperanto havu kiel eble plej multe da belaj kaj bonaj poemoj."

Verŝajne la grandan poluradon kaŭzis ankaŭ tio, ke li vidis, ke restis malmulte da tempo por revizii la rakonton *Auli*. Li ja neantaŭvidite devis sin kuraci en hospitalo. Do li nun klopodis, ke la poemaro enhavu pli la versaĵoj kaj igu imponaspekta. Mi estus devinta peti, ke oni sendu la notojn pri la faritaj korektoj. Tiam subite alvenis presprovaĵoj (pli ol duono de la materialo) kaj ili konsternis nin. En ekscito mi tuj skribis al Kalocsay. La 21-an de junio li respondis:

"... Leginte vian leteron, mi tiris mian kapon inter la ŝultroj, kiel iu sin defendanta kun batoj. Vi estas prava kaj neprava..."

Li penis klarigi, kiel <Rakonto de ventoj> tian redakton, ke temas ja pri ŝerco, do la redaktoro jam pro tio havas pli liberan manon. Sed li ankaŭ ŝanĝis la jam konatajn poemojn, multon aldonis, forstrekis (eĉ belajn strofojn), aliigis la subskribojn, tiel, ke nun estas malfacila orientiĝi. Li tamen ne agis arbitre, komparante la tekstojn oni komprenas la kaŭzojn de liaj korektoj. Tre ofte la rimo ŝajnis al li tre ordinara, li trovis pli konvenan, kaj pro tio la tekstoŝanĝo. Li forigis vortojn kaj formojn, kiujn li mem ne plu ŝatis uzi. Pluraj korektoj ja estas tre bonaj, dum pluraj ĝenas.

La eldonisto skribis, ke laŭ lia opinio Kalocsay nenie ŝanĝis la tembrojn, se al Adamson ne mankus iu eblo tion fari, li profunde dankus la redaktinton. Eble. Adamson ja ŝatis en siaj ŝercaj versaĵoj lude ĵongli per vortoj kaj kelkfoje li kapablis surprizi aliulojn per io mirige.

Eble mi tro severe kondamnis Kalocsay pro la troa polurado. Li ja konvinkite celis la plejan bonon malatentece tio, ke oni rajtas tiom ŝanĝi poemojn de mortinta poeto. Sed li ankaŭ penis freŝigi la versaĵojn de Maria Hankel, Kozlowski, ktp., argumentante, ke li amas ilin kaj volas savi, kio estas valora en ilia poezio. Tre bela intenco, sed mortinto povas nek danki, nek protesti. Al mi ŝajnas, ke ne ĉiam estas facile trovi la saman tembron kaj kiu do volus sin ornamu per fremdaj plumoj.

Ni niaflanke iom rapidis, la eldondemandado ja ne estis tiel urĝa. Oni ne ĉiun antaŭvidas. Ni estus devintaj surloke prizorgi la elekton de la poemoj. Espereble iam pli poste tion faros kompetentuloj, la materialo ja restis.

Hilda DRESEN

(Laŭ ŝia manuskripto 1979)

Manuskripto el la HEJMOLANDO de H. Adamson
Polurita de K. Kalocsay

12.5 Du tradukoj de la poemo *Marto*

En *Literatura Mondo* (1949/78) aperis la poemo de Lajos Áprily kiel traduko de Kolos Imbán.

Kalocsay ĉe la kunmeto de sia bibliografio, registris la tradukon kiel komunan laboron kun Imbán.

Komparante la manuskripton de Imbán kun la aperinta teksto, oni povas konstati, ke Kalocsay anstataŭ plibonigo de la versaĵo opiniis pli oportuna retraduki la poemon. Li cedis la gloron al Imbán. Jen la du tradukoj:

MARTO

Sun' fajre do brilas; knab' kure ekiras
Al monto logata. Sur pint' lia star'
Vigle, ridante, vok-eligante
Pro kri' "Evoe!" resonadu la val'.

Dum dorm' sekiĝinta put', lag' vekiĝinta
Pleniĝas, freŝiĝas de akva ĵus ar'...
Jen parueto, – karbkapuleto
Ĝoj-ditiramb' ĝia: daktilus-ar'.

Silka amento flirtas en vento,
Flave fendiĝas kornela la flor'...
Mistera pro fluo: radio de suno,
Rifuĝas la neĝo timige ja for!

Tinta rideto de l' rivereto:
Al nerapida river' ĝia kur',
Kant' de kurinto, kant de la pinto:
Kant' de la sang', de la sang' via nur!

(Traduko de Kolos Imbán)

Ellogis la brulo de l' suna okulo
La knabon sur monton. Li staras sur pint'
Kaj rida, gojtikla, subkrias per vigla
Pravok' "evoe!" al la val-labirint'.

Put' sekiĝinta, lag' vekiĝinta
Pleniĝas per akvo, inundas al kamp',
Eta paruo karbkapa kun ĝuo
Disŝutas daktilojn de ĝoj-ditiramb'.

Silka amento flirtas en vento,
Kornusoj ekflavas per floro-disfald',
De la firmamento fluas kurento,
Ektimas surmonte la neĝo de l' alt'.

Fluetoj kun tintoj kuras de l' pintoj
Al pigra rivero en vigla humor',
Sonoras la fontoj, sonoras la montoj,
Sonoras, sonoras, sonoras la kor'.

(Traduko de Kálmán Kalocsay)

12.6 "Ribelo" ĉe Hungara Vivo

Kiam la kunlaborantoj de la revuo jam tre murmuris, ĉar la lingva revizianto Kalocsay murdas la "indivduan stilon", la tiama ĉefredaktoro Mihály Gergely aranĝis, ke la redaktora kunsido foje okazu ĉe Kalocsay, kaj la batalpretaj aŭtoroj persone protestu kontraŭ lia "stilboniga" metodo.

D-ro Mátéffy, la responda redaktoro formulis kaj prezentis la plendon antaŭ Kalocsay. La "akuzato" ne senkulpigis sin. Eĉ li faris memkritikon kaj montrante sinceran penton solene deklaris, ke estonte li reduktos la korektadon al gramatikaj eraroj.

La "ribelantoj" trankviliĝantaj foriris.

Kaj de tiu tempo Kalocsay faris la lingvan revizion tute same kiel antaŭe.

12.7 Kiu estis la tradukinto?

(Letero al la redakcio de *Budapeŝta Informilo*).

Nia Literaturamanta Esperanto-rondeto antaŭ nelonge konversaciis pri la proza stilo de Kálmán Kalocsay. Por akiri ĉi-rilatan fonton kaj materialon ni turnis nin al Ada Csiszár, kiu estas aranĝanto kaj gardanto de la Kalocsay-postlasaĵo. La samideanino sendis al ni tajpitan kopion pri la esperantigita novelo *Korpa beleco* kiel tradukaĵon de Kalocsay.

La januara *Budapeŝta Informilo* rememorante pri Karlo Bodó prezentis la novelon kiel tradukaĵon de K. Bodó. Ni komparis la du tekstojn kaj konsterniĝante konstatis, ke ili laŭvorte estas samaj.

Ni petas la redaktaron solvi tiun enigmon. Ni demandas: kiu pravas, ĉu A. Csiszár ĉu BI?

*

(Respondo al la Literaturamanta Rondeto)

Nek Ada Csiszár, nek *Budapeŝta Informilo*, sed Kálmán Kalocsay erarigis nin.

Pro la falsa informo akiri absolvon de la *Literatura Rondeto* ŝajnas necese almenaŭ skize paroli pri la redaktora kaj lingvorevizora agado de Kalocsay.

Probable mi ne babilas sekreton — almenaŭ antaŭ la verkistoj kaj poetoj ne estas sekreto — ke la pli granda parto de la manuskriptoj, kiuj venis al la manoj de Kalocsay tiom aliformiĝis, ke la originala teksto kelkfoje apenaŭ estis rekonebla. Post la korektado la folioj fariĝis tiom inkmakulataj, ke Kalocsay ĝenerale retajpis ilin. Pro ĉi tiu plibonigo multaj ĝojis kaj dankis, aliaj murmuris, ofendiĝis aŭ rekte protestis.

Kio estis la instiga kaŭzo de Kalocsay por fari la stilpolurigan metion? Respondi la demandon eble estas plej konvena citi liajn ĉi-rilatajn vortojn:

"... *La ĉefa afero — almenaŭ por mi — estas, ke ekzistu kiel eble plej riĉa kaj varia malnova-nova-plejnova poezio Esperanta...*"

Kalocsay severe — kaj rajte — ekstermis el la poem-manuskriptoj ekzemple la adasismon (promenadas — babiladas), ĉar kiel li diris: "Ĝi ne estas *rimo*, ĝi estas *krimo*." La lingvoriĉiganto ne indulgis eĉ al la propraj verkoj, se li trovis alian, pli bonan solvon. Kiam aperis la dua eldono de la TRAGEDIO kun reviziita teksto, unu el la recenzantoj skribis:

"Mi ne povas subpremi la konjekton, ke se la verko ĝisvivos trian eldonon, Kalocsay surprizos nin per nova nombro de inventaĵoj, kiuj montriĝos necesaj."

La stilbonigan strebadon Kalocsay kompreneble etendis ankaŭ al la prozo. Revenante al la novelo de *Korpa beleco*. Ĝia Esperanta traduko unuafoje venis sunlumon en *Literatura Mondo* (1923/8), sen indiko pri la tradukisto. Tamen se ni observas en la teksto la frazkonstruon, nombras la vorton "Do" (tiel favorata de Kalocsay) apenaŭ estas dubo, ke la poluriĝema redaktoro tiomgrade korektis la manuskripton, ke fine la tradukaĵo aperis anonime.

En 1926 oni eldonis novelaron de Frigyes Karinthy: *NORDA VENTO*, ene la *Korpa beleco-n* tradukitan de Karlo Bodó. Estas certe, ke tio okazis konsente kun Kalocsay.

Tamen, kiam en 1975 ni komencis listigi liajn verkojn, li mem registris tiun transplantaĵon kiel la propran. Laŭ ĉi tiu slipa indiko mi sendis la novelon al la *Literaturamanta Rondeto*. Tiom pri la misinformo.

La demando — Kiu estis la tradukinto? — esence estas problemo tute ne malofta en la literatura vivo, nome: la dubebla kazo de la spirita kreaĵo.

Sed ne temas pri tio, ke Kalocsay volis "alproprigi" aŭ "repreni" tiun tradukaĵon de Bodó, nur simple tio okazis, ke inter 1926 kaj 1975 pasis preskaŭ duonjarcento kaj Kalocsay tute forgesis la tiaman konsenton kun Bodó. Mia firma konvinkiĝo estas: se Kalocsay estus vivanta, nun li ripetus tiun deklaron, kiun li faris rilate al la "refreŝigitaj" poemoj de Marie Hankel. Jen:

"Nun mi solene deklaras, ke mi rezignas pri ĉiu mia rajto koncerne tiujn ĉi poemojn, do ekde tiu ĉi momento ili estas neekspropriigeblaj la poemoj de Marie Hankel, kaj tial ili povas eniri en antologiojn." (Norda Prismo 1958:4, p. 217).

Ege mi esperas, ke la *Literaturamanta Rondo* akceptos mian argumentadon kaj ankaŭ la konkludon.

Tio estas alia afero, ke la skrupulan biografon — ĉe la listigo pri la vivoverko — inkube premas la tiaspecaj problemoj, sed ties ŝarĝon portu tiu pedantulo sola.

Ada Csiszár

(Repr. el *Budapeŝta Informilo* 1978:4, p. 4-5)

12.8 La literatura pretendemo de Kalocsay

Foje — se mi bone memoras en 1974 — mi ekvidis en montrofenestro de iu librovendejo libreton: MALGRANDA SPEGULO DE LA SLOVAKA LITERATURO. Krom ĝi unu post la alia aperis hungarlingvaj libroj ankaŭ pri aliaj eksterlandaj literaturoj. Tio donis al mi la ideon: ĉu ni ne povus aperigi malgrandan spegulon de la E-literaturo? Kial ne? Ni fieras pri nia preskaŭ naŭdek-jara literaturo, sed nur esperantlingve ni pruvas ĝian ekziston kaj ne en la naciaj lingvoj. Jen libroserio, en kiu ankaŭ la Internacia Lingvo devus havi lokon, ĉar ĝi ekzistas, vivas, evoluas, kaj se eĉ ne ĉiuj verkoj havas literaturan valoron, tamen en ĉi troviĝas ankaŭ perloj. Por la neesperantistoj ni povas pruvi nian pravon, prezentante nian literaturon nacilingve en bonaj tradukoj.

Pri mia ideo mi parolis al kelkaj samideanoj, kiuj direktis min al Kalocsay. Post kelka tempo mi ricevis inviton al lia hejmo. Li afable akceptis min. Post kafotrinkado mi prezentis al li mian ideon. La libro konsistis el du partoj: prozo kaj poezio.

Kalocsay atente aŭskultis min. Vidiĝis, ke li enpense jam elektadas nomojn, verkojn. Vere, li tuj sidiĝis al la skribmaŝino (ho, kia malnova tipo ĝi estis) kaj tajpis poemtitolojn kaj kelkajn nomojn kaj verkojn el la proza tereno. Li promesis, ke li konsideros la demandon, parolos kun tradukistoj, kontaktiĝos kun eldonejoj tuj, kiam la definitiva enhavo pretiĝos.

Post iom da tempo mi interesiĝis pri la afero. La respondo estis, ke li serĉas aŭtorojn kaj tradukantojn ktp. Du aŭ trifoje mi interesiĝis per telefono kaj la respondo estis ĉiam la sama.

Fine sciigis min Ada Csiszár, ke Kalocsay opinias, ke la Esperanta literaturo ne estas tiel evoluinta, ke el ĝi estus konvena kompili tian antologion, kies nivelo atingus tiun de la naciaj literaturoj.

Sendube ekzistas altnivelaj Esperantaj literaturoj — kiel li diris — sed ne tiel multaj, ke ili sufiĉus por tiaspeca eldono. Eble estas nur poemoj tiaj, sed ne prozaj verkoj.

Ĉu Kalocsay pravis? Ĉu li ne estis tro severa en tiu demando? Eble li ne havis tempon, aŭ li okupiĝis pri io alia, pri io pli grava. Ne estas diskuteble, ke Kalocsay konis plej funde nian literaturon, kaj ankaŭ la kapablon de nia tradukteamo.

Tiel okazis ke Kalocsay ne redaktis la proponitan libron kaj la "Malgranda spegulo de la Esperanta literaturo" en hungara lingvo ne aperis.

D-ro István NAGY

(1977)

12.9 Ĉe la juĝisto

En la tridekaj jaroj Ludoviko Totsche verkis kaj publikigis serion de tankaĵoj. Por ĉikani lin, mi sendis perletere la sekvan rimproduktaĵon al Lali.²⁵⁴

Ĉe vi granda E-poeto
Regas mensa tank'-mani',
Adaptigan montri emon
Kantas tanka anka' mi:

Ĉe l' tablo Totsche
Sidas kun barbo blanka.
Kion li faras
Depost centoj da jaroj?
Nu, kompreneble: tanka!

Lali ne maldiligentis per la respondo. Post tri tagoj la sekva tankaĵo elfalis el la koverto:

Eltordas la kolon
De Esperanto Gyurka²⁵⁵
Kiel ĝi estus
Ne latinida lingvo
Sed ja tatara-turka.

Mi tuj protestis ĉe Lali kontraŭ lia envualita aludo pri mia "eltordogita Esperanto".

Post kelkaj tagoj mi vizitis ĉe Kalocsay kaj prezentis al li la diskuton. Kalocsay rekonis mian pravon:

La esprimo "Adaptigan montri emon" per ĝusta vortordo sonus "Montri adaptiĝan emon". La formo "Adaptiĝan montri emon" imitas la latina "poetica licentia"; precipe latinaj poetoj lokis infinitivon ("montri") inter epiteton ("adaptiga") kaj la indikatan vorton ("emo"). Sed propre — aldonis Kalocsay — estas ege diskutebla: ĉu licas tiom da poezia libereco en Esperanto?

Koncerne la poemojn mem, Kalocsay diris nenion, li nur ridetis kaj svingis la manon. Jen Salomona saĝo de Kalocsay.

Georgo KAR CZAG

(1979)

²⁵⁴ Karesnomo de Ludoviko.

²⁵⁵ Karesnomo de Georgo.

12.10 Libroj redaktitaj de Kalocsay

HUNGARA ANTOLOGIO.

Poemoj kaj noveloj de 51 verkistoj. Tradukis: K. Kalocsay, J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche.

Antaŭparolo kaj klarigoj de K. Kalocsay. Studo pri la hungara literaturo de M. Babits.

Portretoj de 47 verkistoj.

Budapest: Literatura Mondo, 1933. 470 p.

Vd en la 3-a vol. p. 48-50.

Dua eldono. Sen ilustraĵoj.

Redaktis V. Benczik.

Budapest: Corvina, 1983. 448 p.

ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO.

Redaktis: L. Kökény—V. Bleier. La lingvofakon red. K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1933-1934.

Du vol. 600 p. + 164 bildopaĝoj.

DEKDU POETOJ.

Antologieto kun la poemoj de H. Adamson, H. Dresen, B. Price Heywood, N. Hovorka, N. Kurzens, G. E. Maura, L. N. M. Newell, A. Núñez-Dubús, A. Schauhuber, E. C. Stillman, F. Szilágyi, L. Totsche.

Antaŭparolo kaj pri la poetoj notoj de Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1934. 126 p.

Bibliografio

Waringhien, G.: LL 1935:2, p. 109-112.

Szilágyi, F.: OL p. 168-169.

Waringhien, G.: Eseoj I. p. 73-90.

Kralj, D.: KPr p. 78-87.

Su, A.: NAER 1963. Novembro-December, p. 192.

GVIDLIBRO II. p. 120-122.

Waringhien, G.: KAJ LA CETER' p. 67-68.

K. R. C. Sturmer: EL LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO.

Aranĝis por preso V. Bleier, K. Kalocsay kaj L. Totsche.

Budapest: Literatura Mondo, 1934. 125 p.

NAŬ POETOJ.

Antologieto kun la poemoj de J. Baudin-Vatré, M. Ĉulitis, G. Falk, L. Jevsejeva, M. Strümpfel, V. G. Sutkovoĵ, R. Swietoszewski, K. Wanselow, Saint Jules Zee.

Antaŭparolo kaj pri la poetoj notoj de Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1938. 68 p.

Ĉi tiu poemaro estis la sepdek oka libro eldonita de *Literatura Mondo*. Tamen la antologieto ne venis al la legantaro, ĉar en la sama jaro evidentiĝis, ke pro financaj kaŭzoj kaj pro la proksimiĝantaj militaj jaroj oni ne povas plu vivteni la revuon kaj la eldonejon. La entreprenon likvidis Béla Berceli (frato de Vilmos Bleier).

Li luis dometon en la antaŭurbo *Kispest* kaj liveris tien ĉiujn ne venditajn librojn kaj presaĵojn. Estis libroj — inter ili la antologieto NAŬ POETOJ — en kruda stato, do ne binditaj. Dum la siego de Budapeŝto tiu staplejo difektiĝis kaj la najbaroj ekvidis kia trezoro — bone bruligeblaj paperoj — estas tie deponitaj kaj ekde la malkovro ili hejtis per la libroj.

Bedaŭrinde oni hejtis tiamaniere, ke la sama duono restis, kaj per tio jam oni povis fari nenion. Kiam post la liberiĝo de Budapeŝto (1945) Béla Berceli revenis, li povis jam savi malmulton.

El la stoko de NAŬ POETOJ ununura mankhava ekzemplero kuŝis dum 35 jaroj en la fundo de la libroŝranko de Kalocsay. Ĝi venis sunlumon en 1973, kiam je mia insisto Kalocsay konsentis ordigi la Esperanto-parton de sia biblioteko. Ĉi tiu ununura ekzemplero — poste kompletigita kaj zorge gardita en la KAL-ĈI Dokumentaro — kaj la entreprenemo de Reinhard Haupenthal ebligis represi la libreton post duonjarcento.

Aperigita en Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1989. 78 p.

Kun postparolo de A. Csiszár kaj bio-bibliografiaj notoj de R. Haupenthal.

*

Kompletigo al la historio de la naŭ lirikistoj:

En la Postparolo de nova eldono oni legas: "La naŭ lirikistoj — kies poemojn Kalocsay decidis gardi en antologieto — kune kun la redaktoro estas jam mortintaj..."

Post tri jaroj de la apero de la libro — dank al la persista esplorado de R. Haupenthal kaj al la netaksebla helpo de Saulcerita Neilande (Latvio) — malkaŝiĝis ke unu el la naŭ, nome Ĉulitis ankoraŭ vivas kaj kiel elmigranto ekde 1952 loĝas en Kanado. Lia kompleta nomo estas Maksis Ĉulitis (La litero "N" estas tiutempe preseraro en la antologieto). Feliĉe, ke almenaŭ unu el la naŭ — post pli ol duonjarcento povis enmanigi la savitan libron.

Bibliografio

Kralj, D.: KPr p. 95.

Su, A.: NAER 1984:Novembro-December, p. 192.

GVIDLIBRO II, p. 122.

Auld, W.: ENKONDUKO p. 59.

Waringhien, G.: KAJ LA CETER' p. 68.

Csiszár, A.: LF 1983:79, p. 12.

Csiszár, A.: HFM 1989:3, posta interna kovrilo.

Píĉ, K.: *Glora antologieto*. IF 1991:1, p. 26-27.

Neilande, S.: *Antologio — Naŭ Poetoj*. Latva Esperantisto 1991:12, p. 7-8.

Kamaĉo, G.: Esperanto 1991/191.

Neilande, S.: *La solvo de literatura enigmo*. IF 1992:2, p. 34-37.

F. Sánta: **DUDEK HOROJ**. Kroniko.

El la hungara tradukis: V. Benczik, I. Botos, L. Somlai, L. Tárkony.

Budapeŝto: Corvina, 1966. 132 p.

H. Adamson: VESPERKANTO. Elektitaj poemoj.

Kolektis J. Ojalo.

La Laguna: J. Régulo, 1967. 132 p.

Bibliografio

NP 1955:2, p. 80.

Vatré, H.: *Svisa Espero* 1968:1, p. 3-4.

Csiszár, A.: *HE* 1968:3, p. 15.

Hauptenthal, R.: *OR* 1968:1, p. 5.

Auld, W.: *Esperanto* 1968/7.

Auld, W.: *HdE* 1971:8, (1507), p. 1.

Rossetti, R.: En: *Kalocsay, la kolosa diletanto*. *Esperanto* 1978/134-135.

Dresen, H.; Ojalo, J.; Seppik, H.: *Defende al Hendrik Adamson*. *Esperanto* 1979/8.

Vd. p. 14-16.

ĈAPITRO 13

LITERATURA MONDO — BUDAPEŝTA SKOLO

13.1 Skizaj indikoj pri la tri periodoj de la revuo kaj eldonejo

La beletra, ilustrita revuo aperis en Budapeŝto inter 1922 kaj 1949 en tri periodoj. La dek ses jarkolektoj produktis entute 3148 paĝojn en formato 30 x 23 cm.

La unua numero

Unua periodo (Oktobro 1922 — Aprilo 1926)

La eldonon de la monata revuo ebligis la financa subteno de D-ro Teodoro Schwartz.²⁵⁶ Li estis ankaŭ la responda redaktoro ĝis Septembro 1924. Ĉefredaktoris Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay.

Anoj de la Redakta Komitato: Paŭlo Balkányi, Paŭlo Lengyel, kaj ĝis Junio 1923 Adalberto Bayer. Sekretario de Aprilo ĝis Aŭgusto 1923 estis Endre Hevesi.

La diversnaciaj eminentaj kunlaborantoj certigis la riĉan kaj valoran enhavon, kaj en la revuo debutis la juna generacio.

Konstanta kunlaborantaro: L. Briggs (Anglino), J. Grau Casas (Kataluno), Helmi kaj Hilda Dresen (Estoninoj), N. Hohlov (Ruso), I. H. Krestanov (Bulgaro), A. Mazzolini (Italo), J. van Schoor (Flandro), T. Morariu (Rumano), P. Nylén (Svedo), E. Osmond (Anglino), P. Stojan (Ruso), M. Solovjev (Ruso), R. Schwartz (Franco), J. Jurysta (Ĉeĥo), S. Z. Braun (Polo), H. Seppik (Estono), D. Eyquem (Franco), Zanonj (ps. de Friedrich Pillath, Germano), S. Kamarýt (Ĉeĥo), P. Varsányi (Hungaro), R. Hromada (Ĉeĥo), Leono Zamenhof.

Malgraŭ la elstara valoro de la revuo, la abonantoj estis nesufiĉaj. Teodoro Schwartz volis fari reklamon al la revuo, tial la stabo prezentis literaturan vesperon respektive kabareton dum la 15-a Universala Kongreso en Nürnberg (1923). Tio ĉi ne multe helpis la financojn de la revuo.

La eldonon de la revuo en Septembro 1924 transprenis la *Hungara Esperanto-Instituto*, respektive ĝia gvidanto D-ro Vince Tóth.

Novaj anoj de la redaktaro: Karlo Bodó kaj Paŭlo Varsányi.

De Aprilo 1925 responda redaktoro estis D-ro Béla Rácz Kövesd.

Kiam evidentiĝis, ke la esperantistaro ne subtenas la revuon tiom, ke ĝia apero estu certigita, Julio Baghy verkis kortuŝajn kaj riproĉajn artikolojn, tamen ne sukcesis savi la revuon. Ĝia lasta numero aperis en Aprilo 1926.

La unua periodo prezentis 40 numerojn kun 696 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.

Kalocsay rememoris pri tiu tempo en la poemo: *Letero al Julio Baghy*

...
Mi vidas, ĉe "Literatura Mondo",
ke ni klopodas kune, en barakto,
pri la agrabla tasko de l' redakto
kaj mankon de la abonantoj spitas.
Kaj vidas mi, ke mi kaprompe ŝvitas
super abon-alvokoj entuziasmaj,
sed ne entuziasmigaj — laŭ la pruvo
de la rezulto. Ho, somera pluvo
de rememoroj! Kiom da kvereloj
amikaj pri tre gravaj bagateloj!
rankoroj! repaciĝoj! kunaj taskoj!
kiom da planoj! kiom da fiaskoj!
Kaj, vi demandas, kiom da rezulto?
Nu, se paroli vere, ne tro-multo
kompare tion, kion ni intencis.
Kaj tamen, se ni povus rekomenci,
ni ja komencus, kiel ni komencis,
ĉu ne? Ni nin ne lasas kondolenci!

257
...

* * *

Dua periodo (Januaro 1931 — Aprilo 1938)

En 1930 folieto heroldis la renaskiĝon de la revuo. Laŭ la komuniko la celo de la redakcio: *evolui la lingvon, perfektigi la literaturan stilon, instigi verkistojn malnovajn, allogi kaj eduki novajn. Krome — amuzi kaj emocii la legantojn.*

La duan periodon de la revuo ebligis la talento kaj ĉefe organiza kapablo de Vilmos Bleier. Li sukcesis akiri kelkajn — vere nur kelkajn — mecenatojn, kiuj emis oferi certan monon sur la altaro de la Esperanta literaturo.

La du ĉefredaktoroj estis ree Baghy kaj Kalocsay, responda redaktoro Karlo Bodó, kunredaktoroj Ferenc Szilágyi kaj Ludoviko Totsche.

"La knabino ne mortis nur dormis" oni legas en la salutvortoj de la unua numero de la revuo. La fenikse renaskiĝon de *Literatura Mondo* ĝoje akceptis verkistoj kaj fidelaj legantoj. Venis entuziasmaj, kuraĝigaj salutleteroj, kiuj montris la mankon post la ĉeso de la revuo.

En tiu tempo la cenzuro estis forta en Hungario, tamen la revuo publikigis ĉion, kion la redaktoroj konsideris literature valora. Ferenc Szilágyi skribas:

"Mi memoras okazojn, kiam la gazeto havis du variantojn, unu preskaŭ nur al la hungaraj magistratoj kaj la alian, kiun sendis eksterlanden kaj en kiu estis kelkaj artikoloj, ne konvenaj al la vido de la pli kaj plifortiĝanta hungar-reakcio."²⁵⁸

Kalocsay rekolektis la kunlaborantojn de la unua periodo. La revuo invitis publikigi ĉiujn verkistojn, poetojn, tradukistojn kaj gramatikistojn.

La kunlaborantaro de la unua periodo tre vastiĝis. Ĉeestis ĉiuj gravaj nomoj de la tiutempaj verkistoj, vere elita kaj internacia stabo. La revuo baldaŭ iĝis ankaŭ debutejo de la nova generacio. Jen:

J. D. Applebaum (Polo, poste angla statano), A. Behrendt (Germano), P. Bennemann (Germano), S. Barta (Hungaro), M. Beraru (Rumano), J. Berger (Germano), M. Blassberg (Polo), Helmi kaj Hilda Dresen (Estoninoj), R. Eichenbaums (Latvo), S. Engholm (Svedo), J. Forge (Polo), S. Grenkamp-Kornfeld (Polo, poste franca statano), Parvus Piscis (ps de L. Halka, Hungaro), N. Hovorka (Aŭstro), R. Hromada (Ĉeĥo), S. Kamarýt (Ĉeĥo), F. Karinthy (Hungaro), T. Jung (Germano), I. Jurysta (Germano), P. Firu (Rumano), E. Knutsson (Svedo), I. Lejzerowicz (Polo), W. Lippmann (Germano), M. Lukáš (Ĉeĥo), T. Morariu (Rumano), A. Mazzolini (Italo), L. N. M. Newell (Anglo), P. Nylén (Svedo), J. van Schoor (Flandra), H. Seppik (Estono), J. Ŝimomura (Japano), R. Schwartz (Franco), K. Robinson (ps. de K. R. C. Sturmer, Anglo), G. Waringhien (Franco), E. Wiesenfeld (Polo), Z. Zahariev (Bulgaro), FeZ (ps. de Feliks Zamenhof), Leono Zamenhof, Lidja Zamenhof.

La enhavo de la revuo estis tre riĉa. Ĝenerale enhavis du studojn, kvar novelojn (originalajn kaj tradukitajn), dek-dekdu poemojn. Konstanta rubriko estis la *Diskuto* (ĝenerale temis prilingvaj demandoj), *Recenzo*, *Binoklo*. Populara konstanta rubriko estis la *Observo*, kiu celis informi la legantojn pri artaj eventoj kaj literaturoj nacilingvaj.

La revuo de tempo al tempo dediĉis numerojn al nacia arto kaj literaturo. Aperis estona, ĉeĥa, sveda, jugoslava, pola, itala, latva, franca numeroj.

Bleier samtempe de la revuo fondis ankaŭ la plej aktivan eldonan entreprenon. Dum la jaroj 1931 kaj 1938 li eldonis proksimume 80 librojn ĝenerale altnivelajn kaj valorajn, inter ili bazajn verkojn de la Esperanta kulturo.

*

Verkistoj — inter ili Baghy kaj Kalocsay —
frapetas la pordon de la eldonisto Bleier
Karikaturo de STEBA

Malpaco ĉe Literatura Mondo

Kvankam la polemiko pri neologismo estas samaĝa kun la lingvo, tamen la komencon de la impeta batalo oni povas kalkuli de 1932, kiam aperis la PARNASA GVIDLIBRO de Kalocsay–Waringhien.²⁵⁹ En ĝia *Poezia Fakvortaro* listigitaj 602 neologismoj tre ŝokis la kontraŭneologojn, kaj incitis ankaŭ la galon de Baghy. Sur la paĝoj de la revuo komenciĝis arda disputo inter Baghy kaj Kalocsay. Eksplodis la neolog-milito.²⁶⁰ Komenciĝis kampanjo kontraŭ *Literatura Mondo* kaj la revuo perdis abonantojn. En la unua n-ro de 1933 J. Baghy deklaris ke pro la neologismemo de la revuo li abdikas pri la ĉefredaktora titolo.²⁶¹ De tiam Kalocsay redaktis sola.

La redakton de *Literatura Mondo* Kalocsay faris tre zorgeme. Li tralegis, kaj se bezonis korektis ĉiujn publikigitajn manuskriptojn.

Kalocsay konsideris la kritikon kiel gravan kontribuon al la evoluo de la literaturo kaj li instigis analizajn taksadojn de la verkoj. En la 16-paĝa revuo mankis loko por detala recenzo de la pli kaj pli multiĝintaj novaj libroj, tial la LM-Eldonejo en 1933 aperigis kvaronjaran kritik-revuon sub titolo *Bibliografia Gazeto*. Baldaŭ ĉi tiu recenzejo pruviĝis malvasta kaj la stabo en 1934 aldonis kiel suplementon de *Literatura Mondo*, la grandformatan *Lingvo-Libron*. Ambaŭ aldonaĵoj estis senpagaj por abonantoj de *Literatura Mondo* kaj anoj de AELA. En ĝi aperis valoraj studoj pri novaj verkoj kaj prilingvaj diskut-artikoloj.

La unua n-ro de *Bibliografia Gazeto*

La ĉefartikolo skizas kelkajn sekvindajn,
ĉefe etikajn principojn de la kritiko,
prilaboritajn de Kalocsay kaj Tárkony.

El ĝi aperis 4 n-roj kun 70 paĝoj en formato A/5.

1934. La unua n-ro de *Lingvo-Libro*
en la manoj de Kalocsay

Tiu ĉi suplemento donis 15 n-rojn kun 306
paĝoj.

*

Literatura Mondo en 1933 fondis kooperativan laborkomunon: *Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj* (AELA), kies celo estis doni valorajn kaj malkarajn librojn al la membroj de la Asocio. La membroj rekrutiĝis ĉefe el inter la abonantoj de la revuo. Fariĝis membro, kiu pagis por la kuranta jaro la abonkotizon. Por la libroamantoj la AELA-membreco estis avantaĝa, ĉar ili ricevis por la duona aŭ triona prezo valorajn librojn. Ankaŭ por *Literatura Mondo* estis ĝi avantaĝa, ĉar la abonantoj garantiis almenaŭ minimuman kvanton de la venditaj libroj.

En la fondo-jaro la membro-nombro estis 960. En tiu jaro ili ricevis ses librojn kun 1800 paĝoj, inter ili ankaŭ la du volumojn de la ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO.

Laŭ la regularo de AELA la membroj rajtis baloti pri aperigo de libroj proponitaj de la Eldonejo.

La libroj aperis ĝenerale en 1000-2000 ekzempleroj escepte gramatikajn verkojn, lernolibrojn kaj la ENCIKLOPEDION de ESPERANTO. Ekzemple la PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO; LINGVO, STILO, FORMO; PARNASA GVIDLIBRO kaj la ESZPERANTÓ NYELVTAN (Esperanta Gramatiko) de Szilágyi aperis en pluraj miloj.

Per tiu eldona metodo la aĉetantoj kaj la eldona firmao ekhavis senperan kontakton, estis eliminataj la revendistoj, kio ne plaĉis al ili, kaj tio kaŭzis certajn malfacilaĵojn. Malgraŭ tio la sistemo prosperis. Vilmos Bleier sukcese venkis barojn, ankaŭ financajn kaj donis firman bazon al la entrepreno.

Sloganoj de AELA

Al kriza drako
Surpriza hako

AELA!

*

Por etkvanta monsumeto
Pleniĝanta librobreto

AELA!

*

Nia sperto kaj rimarko,
Libron nur kun LoMo marko!

*

Librojn legi necesas,
Eldonigi ne ĉesas

AELA!

*

Preskaŭ per groŝoj
Donas ses librojn

AELA!

*

Kelkuloj miras: Donaco
Kalkuloj diras: Sagaco

AELA!

Karikaturo de Stefano Barta pri la redaktoroj de *Literatura Mondo*

1938. Dikaj nuboj kolektiĝas super Eŭropo

Jam evidentiĝis, ke la hitlera naciismo preparas novan mondmiliton. La fidelaj abonantoj hezitis sendi sian abonon al Mez-Eŭropo, kie la situacio fariĝis pli kaj pli minaca. Por plu vivteni la entreprenon — kiu certigis al si gvidan rolon dum pluraj jaroj — Vilmos Bleier en granda komunikaĵo deklaris, ke la revuo kaj libroj aperos ankaŭ estonte, se ne en Hungario, ie en eksterlande.²⁶² Eĉ la eldonista promeso ne savis la revuon. Finiĝis la dua, tiu brila periodo de *Literatura Mondo*, sed la libroeldonado funkciis kelktempe.²⁶³ Tiu periodo prezentis 68 numerojn kun 1582 paĝoj riĉe ilustritaj.

* * *

Tria periodo (Januaro 1947 — Aŭgusto 1949)

Finiĝis la dua mondmilito. Renaskiĝis *Literatura Mondo*. La revuo fariĝis dumonata, preskaŭ sen ilustraĵoj kaj kun papero malpli luksa. Béla Berceli (Bleier), fervore daŭrigis la laboron de la mortinta frato Vilmos. Ree Kalocsay estis la ĉefredaktoro.

Stabo de la redakta komitato: Ferenc Szilágyi, Ludoviko Tárkony (Totsche), Gaston Waringhien. Ĉefkunlaboranto Julio Baghy.

En la enkonduka artikolo Kalocsay rememoris pri Vilmos Bleier, li fariĝis viktimo de la milito en 1940. En nigra kadro viciĝas nomoj de kunlaborantoj forpasintaj: Hendrik Adamson mortis en 1946 pro ftizo, viktimoj de la "bruna uragano" fariĝis Helmi Dresen, Izrael Lejzerowicz, J. Ŝapiro, Eduardo Wiesenfeld, Lidja Zamenhof.

La unua numero konsistas grandparte el la kompostita materialo, kio jam ne povis aperi en la lasta antaŭmilita numero. *Per tio ni kvazaŭ gardas nian kontinuecon* — oni legas rimarkon sur la posta kovrilo — *simbole forviŝante la barbaran intertempon*.

33

Novaj nomoj aperis sur la paĝoj de revuo, inter ili diligentaj kunlaborantoj: William Auld, John Sharp Dinwoodie, Reto Rossetti (anoj de la Skota Skolo); Jirí Korínek, Karolo Píĉ, Tomaš Pumpr, Bojĵdar Vanĉik, Roger Bernard, Brendon Clark, Poul Thorsen, ktp.

Ofte aperis ĝis tiam nekonata nomo: K. Stelov (K. St.). Sub tiu nomo kaŝis sin Kalocsay. La taŝko de tiu elpensita rusa nomo estis "internaciigi" la revuon, ĉar en tiu tempo mankis kunlaborantoj el la Sovetunio. (La stalina reĝimo ne favoris Esperanton). Por la magistratoj de la tiutempa hungara reĝimo, nomo de rusa aŭtoro estis kvazaŭ garantio pri la lojaleco de la Esperanta movado al la popola demokratio. Tiun "trompon" tenis Kalocsay en plej severa "sepsigela" sekreto. Li estis tre singarda. K. Stelov esperantigis ekskluzive poemojn kaj novelojn de rusaj aŭtoroj, observis kaj konigis artajn, literaturajn eventojn okazintajn en Sovetunio. K. Stelov perfekte plenumis sian taskon, kaj dum pli ol duonjarcento konservis la inkognitecon.²⁶⁴

La financa situacio de *Literatura Mondo* estis tre malbona. La nombro de abonantoj ne sufiĉis kovri la altegan preskoston. Nun mankis la enspezo pere de la grandskala libroeldonado, kio en la dua periodo kovris la deficiton de la revuo.

En 1948 akriĝis la "malvarma milito". Kelkaj abonantoj rifuzis reaboni la revuon pro ties

"linio", skribante, ke ĝi estas plie Literatura Orient-Eŭropo, ĝi laŭdas la "ruĝan faŝismon", kaj samtempe kondamnas la demokratian, liberan Usonon. Jes. En tiuj jaroj la agado de Esperanto severe kontrolis la ŝtatajn instancojn, esperantajn eldonaĵojn oni rigore cenzuris. La movado devis submetiĝi al la postuloj de la reĝimo. En 1949 ankaŭ en Hungario pli kaj pli influis la personkulto, fortiĝis la diktaturo. Ĉesis la Esperantlingva radio-dissendo, ne aperis plu esperantaj gazetoj.

En 1949 ankaŭ *Literatura Mondo* eksilentis. Ĉi-foje definitive.

La lasta numero

Ĝi donis 16 duoblajn numerojn
kun 512 paĝoj.

Estas malfacile taksii la servon, kiun Literatura Mondo faris al e-ismo — oni legas en GVIDLIBRO II — sed oni povas aserti, ke dum du jardekoj, ĝi estis la pulmo per kiu spiris la plej viva parto de niaj literaturistoj.

La efiko kaj renomo de *Literatura Mondo* ne ĉesis kun ĝia eksilento. En Tokio fondiĝis kooperativo por la represo de la revuo. En 1975/76 aperis la sesvoluma represo en 300 ekzempleroj. Bedaŭrinde ĝia vartisto ne ĝisvivis la honorigon.

La Budapeŝta Skolo (1919 — 1939)

Dum dudek jaroj Budapeŝto estis la centro de intensa aktiveco arta kaj intelekta, kiu grave influis nian literaturon, ĝin riĉigis per pluraj ĉefverkoj, kaj eĉ nun ankoraŭ efike disradias. Esceptaj cirkonstancoj tie kaj tiam kunigis la du plej grandajn poetojn, plejadon da mirinde dotitaj beletristoj, energie kapablan eldoniston kaj fortan lokan movadon.

Oni nomas "Budapeŝta Skolo" (foje malice, foje estime) beletran kaj porlingvan movadon de tre alta prestiĝo, kiun iniciatis Kolomano Kalocsay kun aliaj talentaj verkistoj plejparte hungaraj kaj spirite ligitaj al la revuo kaj eldonejo *Literatura Mondo*, sen ke tamen la celoj de la revuo, eldonejo kaj skolo plene identus. Pli ol strikte lokitan grupon kaj agadon, la epiteto signas kulturalan tendencon senteban ankaŭ ekster Hungarlando kaj eĉ trans difinita periodo. Kiel multaj aliaj etiketoj en la literaturo, tiu ĉi montriĝas nur oportune indika, ne rigore specifa.

Fakte *Literatura Mondo* ne eldonis nur verkojn de tiu ĉi skolo, nek ĉiujn el la plumo de ties anoj. Ekzemple, la traduko de LA FLOROJ DE L' MALBONO, aperinta en 1957 ĉe Stafeto, historie fontas el la Budapeŝta Skolo. Aliparte, Julio Baghy rilatas al ĝi pli fizike ol morale, ĉar se origine li eminente aktivis en ties medio kaj poste ĉiam konservis kun ĝi ian ligon, li ankaŭ nete apartiĝis disde ĝiaj evoluaj tendencoj, pro personaj kaj principaj motivoj. La franco Gaston Waringhien certe pli proksimas al ĝi pro multjara kunlaboro kaj intima penskonkordo kun Kalocsay.

La Budapeŝta Skolo sankciis novan manieron pensi kaj senti nian literaturon. Tuj definitive forlasinta la vojon de la diletantismo, ĝi klare konsciis pri la signifo de sia grandioza tasko. Ĝi fervore kultis kaj senlace diskonigis estetikajn valorojn, evoluigis la esprimrimedojn per senprecedenca tekniko, rezervis aparte indan lokon al la poezio, provizis la legantan publikon per didaktitaj libroj, vere metodaj iloj de ekkono, kaj levis la recenzan kritikon ĝis tre alta nivelo. Oni povas diri, ke ĝi instruis al tuta generacio la arton ĝue legi.²⁶⁵

256 Patro de Georgo Soros, kiu establis fondaĵojn en pluraj landoj.

257 En: Arĝenta Duopo p.12.

258 En: NLR 6. 1961:36, p. 213-214.

259 Vd en la 5-a vol. p.62-66.

260 Vd en la 5-a vol. 2-25.

261 La vera kaŭzo de lia abdiko estis la kontraŭeco kun Bleier, kiu ne povis pagi la rajte postulatan honorarion al Baghy. Poste, en la decembra numero li faris grandaniman reĝustigon: "Malutili al la gazeto mi ne deziras, kaj pro tio mi deklaras, ke ne pro principaj diferencoj lingvaj mi adiaŭas de miaj budapeŝtaj kolegoj."

262 En: LM 1938:1, unua interna kovrilo: *Eŭropo hodiaŭ — similas al vulkano*.

263 Ferenc Braun, helpanto de Bleier, en Honkong presigis la unuan volumon de ĈU LI? de Vallienne kaj la duan parton de la ARTHISTORIO de Hekler (bedaŭrinda ĝi perdiĝis).

264 Ĝi estas malkaŝita en la kajero: A. Csiszár: *SENVUALE — Pri la pseŭdonimoj de Kálmán Kalocsay*. Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro 1999. 25 p.

265 Laŭ la manuskripto de G. Waringhien.

13.1.1 Esenca bibliografio

- Kalocsay, K.: *Al la legantoj*. (Naskiĝis Literatura Mondo).
LM 1922/1-3.
- Anonime: *Literatura Mondo*. (Saluto al la ĵus naskiĝinta revuo).
HE 1922:10, p. 10-11.
- Baghy, J.: *Ĉu mortis aŭ dormas — la konscio de la esperantistaro?*
LM 1926/136, 149. Vd p. 27.
- Kalocsay, K.: *Literatura Mondo*. (Pri la baldaŭ renaskiĝonta revuo).
HH 1930:7, p.1.
- Kalocsay, K. (anonime): *Saluto kaj salutoj*.
LM 1931/1.
- Szilágyi, F.: *Terura vizito en nia Redaktejo*. (Humora artikolo kun karikaturo de St. Barta).
LM 1931/146-147. Vd p. 32.
- Anonime: *Kara leganto*. (Bilanco pri la forpasinta jaro).
LM 1932/1.
- Anonime: *Triobla tri minutoj*. (Intervjuo pri AELA).
LM 1932/135.
- Anonime: *Kara Leganto!* (Bilanco pri la forpasintaj du jaroj).
LM 1933/Januaro, unua interna kovrilo.
- Anonime: *Literatura Mondo*.
En: EdE p. 345-346.
- Anonime: *Novan jaron komencas Literatura Mondo*.
LM 1934/Januaro, unua interna kovrilo.
- Anonime: *Literatura Mondo*.
HH 1936:1, p. 6.
- Szilágyi, F. En: *Liriko de nia poezio*.
En: ORA LIBRO p. 162-169.
- Kalocsay, K.: *Tria periodo*.
LM 1947/1-2.
- Degenkamp, G. J.: En: *Diversnacieceo*.
En: ESPERANTO 60-JARA p. 39-40.
- Anonime: *Pro domo*: (Respondo al la legantoj pri la enhavo de la revuo).
LM 1948/60-61.
- Capp, C. D. A.: *La feniksa revuo*.
TBE 1952:Majo-Junio, (565-567), p. 165-167.
- Auld, W.: *Literatura Mondo*.
En: EA/1, p. 16-22; EA/2, p. 836.
- Kralj, D.: "*Literatura Mondo*".
KPr p. 165.
- Szilágyi, F.: *Zigzade en iamujo*.
NLR 6. 1961:35, p. 173-177, daŭrigo 6. 1961:36, p. 211-215.
- Vatré, H.: *Iom pri nia literatura historio. La Budapeŝta Skolo*.
Svisa Espero 1964:4, p. 3.
- Kalocsay—Balkányi—Vatré: *Budapeŝta Skolo — Literatura Mondo*.
En: GVIDLIBRO II. p. 113-114.
- Waringhien, G.: *La Budapeŝta Skolo*. (Prelego en la Somera Universitato dum la 51a UK en Budapeŝto, 1966).
Presita teksto: HV 1967:1, p. 2-4, 1967:2, p. 3-5; Repr. en: KAJ LA CETER' p. 55-69.

Kalocsay, K.: *Vilmos Bleier*. (Rememoro pri la iama refondinto de Literatura Mondo). HV 1968:4, p.1-3; repr. en: BI 1978:5, p. 4. fragmento.

Benczik, V.: *Jubileo de Literatura Mondo*. HV 1972:4, p.1-3.

Kalocsay, K.: *La tri vivoj de Literatura Mondo*. HV 1972:4, p. 4-5.

Kökény, L.: *La libroeldon-agado de Literatura Mondo*. HV 1972:4, p. 6.

Auld, W.: *La heroo revuo*. Esperanto 1974/126-127.

Kalocsay, K.: *Kelko pri la starto de Literatura Mondo*. HV 1975:3, p. 5.

Fejes, M.: *Persistaj presistoj. Ĉe presisto de Literatura Mondo* — J. Bénik. HV 1976:4, p. 8-9.

Auld, W.: *Kalocsay kaj la skolo de "Literatura Mondo"*. En: ENKONDUKO III, p. 43-61.

Silfer, G.: *La sperto de LM*. LF 1980:62, p. 90-91.

Vatré, H.: *Mozaike pri la iama budapeŝta itinero*. LF 1981:69, p. 7-10.

Fajsz, K.: En: *Rememoro pri Vilmos Bleier*. HFM 1988:2, p. 22-23.

Ertl, I.: LAJOS TÁRKONY KAJ LA BUDAPEŝTA SKOLO. (Literatura studo). Vieno: Pro Esperanto 1990. 47 p. 30 cm.

Vatré, H.: *Du jarojn ĉe Literatura Mondo*. IF 1991:3, p.84-88.

Csizár, A.: *Literatura Mondo — Budapeŝta Skolo*. En: IN MEMORIAM DR. KALOCSAY KÁLMÁN. Budapest: Kalocsay K. Baráti Társaság, 1994. 100 p.

Bérci, Darázs: *Memori pri Kalocsay*. (Parto de la artikolserio: *La Titana Skolo*. En: Oomoto 1970/71); DB 1987:Junio, (37), 2001:Julio, (125), p. 48-49.

13.1.1.0 Notoj kaj referencoj

HE 1924:6, (6-7/a) p. 1; 1924:7-8/a, p. 53;1925:7-9, (76-78/a) p.34.

Esperanto Kiboŝa 1931:3, p. 12.

NE 1935/Januaro, p. 24.

AD p. 106-108. Tárkony, L.

LM 1947/60. *Informoj de la administracio*.

SKIZO p. 69. Novobilský, V.

Boletín 1956:1, (85), p. 245. Rossetti, R.: *Literatura Mondo kaj Stafeto*.

EM 1974:10, p. 10.

BI 1977:4, p. 4. Golden, B.: *Teodoro Schwartz*.

Aŭstralian Esperantist, The 1979:Maro, p. 210-211. Golden, B.: *Vespermanĝo kun Teodoro Schwartz*.

BrE 1979:Septembro-Oktobro, p. 267. W. A: *Librokultura renesanco en Hungario*. (Intervjuo kun V. Benczik).

HdE 1983:4, (1711), p. 6.

NE NUR p. 26-29. Boulton, M.

HFM 1991:1, p. 5-8. Gulyás, I.: *13+1 demandoj*. (Intervjuo kun Fajsz, K.).

Fonto 1994:157, p. 13. Auld, W.

13.2 Rememoroj pri la naskiĝo de Literatura Mondo

Oni devus verdire skribi, ke "nasko", ĉar temas pri mia klopodo, ke tiu revuo, kiu donis novajn fortojn kaj direktojn al nia kultura movado, naskiĝu ĉe indaj "gepatroj".

Antaŭ ĉio mi devas paroli mia samaĝa amiko Teodoro Schwartz (post nomŝanĝo Soros), al kiu mi sugestis realigi la planon de kelkaj literaturamantaj esperantistoj: fondi literaturan revuon mankantan en Esperantujo. Dum la unua mondmilito mi servis — kiel juna rezervleŭtenanto — ĉe la *Imperiestra kaj Reĝa Infanteria Regimento* en Galicio. Tie servis ankaŭ Teodoro Schwartz kiel subleŭtenanto. Mi eĉ tiam ne forgesis infekti mian ĉirkaŭaĵon per Esperanto, kaj sukcesis varbi kelkajn oficirojn, kiuj komencis lerni nian lingvon. T. Schwartz estis inter ili (certe akiri mian plaĉon).

Sur la batalkampo ni feliĉe evitis multajn danĝerojn, sed Teodoro falis en militkaptitecon ĉe la rusoj. Post la milito, kiam ni renkontiĝis en la *Budapeŝta Esperanto-Grupo*, li jam estis doktoro pri juro, sukcesa advokato. Tiutempe ni kelkaj — ĉefe Kalocsay, Baghy, Bayer kaj mi priparolis: kiel oni ekirigu literaturan revuon. Teodoro entuziasmiĝis pri nia plano, kaj li emis finance helpi la entreprenon. Tio ŝajnis al ni kiel bela sonĝo. Ni ĉiuj estis tiam junaj fraŭloj. Multfoje ni kunvenis en la malgranda, sed komforta fraŭla loĝejo de Schwartz (Strato Andrásy n-ro 81) kaj ĝis malfruaj vesperaj horoj ni planis, diskutis la eblecojn, faris kalkulojn, eldiris revojn. Kiam temis pri la titolo de la revuo oni akceptis mian proponon: *Literatura Mondo*. Same mi ekpensis, ke ni povos fari la revuon eleganta kaj ilustrita, se ni prunteprenos taŭgajn kliŝojn de bildoj el la konata similforma hungara literatura revuo *Új Idők* (Novaj Tempoj). Mi jam ne rememoras, kiu el inter ni — eble mi mem — aranĝis la aferon. Feliĉe ni ricevis taŭgajn desegnaĵojn, kaj tiel ni povis pretigi por ĉiu numero apartan titolpaĝon. La eldonisto kaj kaj responda redaktoro fariĝis Teodoro Schwartz. Poste aliĝis al la redaktorado la veterano Paŭlo Lengyel.

En 1923 ankaŭ mi partoprenis en la kunsidoj de la redaktorado, kelkfoje mi verkis recenzojn, sed mia alispeca agado: UEA-delegiteco, informoj por eksterlandaj gazetoj, kaj aliaj movadaj aferoj ne lasis tempon verki por *Literatura Mondo*.

Kia ĝojega estis kiam en Oktobro 1922 aperis la unua numero, kies enkondukan artikolon pri la "novnaskita bebo" verkis Kalocsay. Jen ĝiaj lastaj linioj:

Kaj nun, kara infano, iru kien la sorto kondukas vin. Mi eksilentas, nun salutu vi la leganton, eble via naiva infanvoĉo pli profunde penetros en la korojn.

"Mia prozo, miaj rimoj	Volas mi el eta ĝermo	Kion dolĉa Muz' kun beno
Estas peto kaj allogo,	Kreski, flori, lukti, spiti,	Donas por volupto pura:
Frapas pordojn de l' animoj		Volas mi per brava skermo Ĉiujn
florojn de l' ĝardeno		
Por kunhelpo kaj apogo.	Tutan mondon almilite.	Arta kaj literatura.

Karaj fratoj, ĉesu dormi!	Kaj per milda tuŝ' al koroj	Fratoj, do al via sin'
Jen la sorto kubon ĵetis.	Porti: revojn, larmorulon,	Prenu min, la infaneton,
Estas, kion nun mi petis,	Kaj konsolan, molan lulon,	Ho, aŭskultu mian peton,
Same por vi, kiel por mi.	Kaj ŝercvicon al doloroj:	Legu, amu, verku min!"

*

Post la apero de la revuo tuj anoncis sin kunlaborantoj el multaj landoj. Mi devas menci, kiel entuziasme akcepis la revuon ankaŭ la hungaraj esperantistoj. La oficiala gazeto de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* verve salutis la revuon:

"Kun ĝojo ni salutas Vin, jam de longe atendatan. Kun amo ni akceptas Vin, jam de longe deziritan. Kun espero ni prenas vin, kaj kun espero mi sekvos vian vojon.

De jaroj la mondo ne havis literaturan gazeton Esperantan, kaj jam de jaroj ni atendas, ke niaj literaturistoj eldonu ĝin! Fine ĝi naskiĝis! Naskiĝis en la malgranda Hungarlando, kie ankoraŭ malmultaj estas la esperantistoj, sed ĝuste pli forte montras la kulturvaloron de nia nacio, se el tiu malgrado povas ekĝermi tia frukto!... *Literatura Mondo* signifos certe novan linion ne nur en la historio de la hungara Esperanta movado, sed por la tuta mondo! Ĝi estos tute internacia, pure literatura, en inda eksteraĵo, inda enhavo. Gazeto, kia ankoraŭ ne estis en Esperantujo."²⁶⁶

Ankaŭ hungarlingvaj gazetoj raportis pri la apero de *Literatura Mondo*. Eĉ la germanlingva *Pester Lloyd* detale skribis pri ĝi.

Tiutempe ni ne esperis, ke la modesta komenco preparos veran mondgazeton, la tiama ebligo de libro-eldonado antaŭpreparos la aperigon de gravaj verkoj fare de Vilmos Bleier, kiu meritas porĉiaman honoron. Sed tiu historio jam apartenas al la dua periodo de *Literatura Mondo*.

Paŭlo BALKÁNYI

(1977)

266 En: Hungara Esperantisto 1922:10, p. 10-11.

13.3 Kalocsay rakontas ...

La 4-an de Oktobro en 1975 Mihály Gergely, tiama ĉefredaktoro de *Hungara Vivo faris* intervjuon kun Kálmán Kalocsay. La konversacion sonbendigis Lajos Kapitány. La hungarlingvan konversacion esperantigis Ferenc Bartók.

*

Antaŭ ĉio ni ŝatus aŭdi ion de vi pri la Budapeŝta Skolo kaj la revuo Literatura Mondo, kiu hodiaŭ jam estas kvazaŭ legendo. Kiel vi kapablis efektiviĝi la planon, kion de tiam oni ne povis ripeti en Esperantujo, kvankam nia movado bezonus ankaŭ nuntempe similan agadon, ĉar tiu ĉi ideo meritas, ke ĝi atingu triumfon.

Kiel sukcesis la fondo de Literatura Mondo? Nu, al tio estis bezonataj du aferoj: stabo, kiu verkas la literaturon kaj entrepenulo, kiu financas la revuon. Hazarde ĉi tie en Budapeŝto ambaŭ kondiĉoj estis donitaj. En la unua periodo de la revuo la financanto estis Teodoro Schwartz, Budapeŝta advokato, kiu esperis, ke li "riĉiĝos" fare de tiu ĉi entrepreno. Tiutempe la valuto-rilatoj estis por ni favoraj, tio estas la abonprezoj enpagitaj eksterlande valoris ĉe ni multon. Do ni prikalkulis: se ni aperigas la revuon en 5 mil ekzempleroj, el la profito ni povos aĉeti tiun pluretaĝan domon, kiu troviĝas sur la placo Oktogon, kaj ni redaktos kaj eldonos tie la revuon. Bedaŭrinde ĉi tiu bela plano fiaskis pro tio, ĉar ni ne sukcesis varbi 5 mil abonantojn. Verŝajne tiom da abonprezo ne kapablus realigi tian naivan esperon. Vane ni provis ion ajn, ni akiris nur 300 abonantojn. Ni skribis artikolojn kortuŝajn ĝis larmoj, ni petis helpon, subtenon de aliaj ĵurnaloj, sed neniu apogis nin krom la poetoj. Ili sendis poemojn amase, ke mi apenaŭ povis eĉ stapli la manuskriptojn. Ni provis ankaŭ tion, ke ni vizitis kongresojn kaj tie ni prelegis, ni aranĝis ankaŭ teatrajn prezentadojn, sed ĉi tiuj provadoj restis sen sukceso kaj sen profito.

Kiam Teodoro Schwartz vidis la situacion, ian belan tagon deklaris, ke li ne faros plu la aferon, kvankam li tre ŝatas Esperanton, li jam ne povas elteni la deficiton.

Post tio ni metiĝis sub tutelon de Vince Tóth, kiu fondis la *Hungara Esperanto-Instituto-n*. Pli frue li studis teologion, sed kiam li aliĝis al ni, li jam estis policoficiro. Cetere Vince Tóth ankoraŭ vivas, li estas jam pensiulo. Lia nomo troviĝas ankaŭ en la Jarlibro de UEA kiel delegito de la filatelistoj en Budapeŝto. Vince Tóth opiniis, ke nia revuo povos prosperi tiel, se ni okupiĝas ankaŭ per libroeldonado kaj pere de tiu entrepreno ni akiros monon por *Literatura Mondo*. Do Vince Tóth eldonis "La tragedio de l' homo" de Madách esperantigitan de mi. Helpe de tiu libroeldono nia revuo pluvivis unu kaj duonjarojn.

Poste pro monmanko sekvis paŭzo. Tiu ĉi stato daŭris ĝis 1931, kiam Vilmos Bleier kunvokis nin, kunlaborantojn de *Literatura Mondo*: ĉeestis Ludoviko Totsche/Tárkony, Julio Baghy, Ferenc Szilágyi (li tiutempe loĝis ankoraŭ en Budapeŝto), Károly Bodó kaj mi. Bleier eksplikis, ke li denove ekirigos la revuon, kiun li destinas kvazaŭ ŝildon de libroeldona firma. Ni tre ĝojis pri tiu plano, kaj en 1931 — post sesjara paŭzo — denove startis la revuo. Do komenciĝis la dua periodo de *Literatura Mondo*. Kaj aperis libroj unu post la alia. En ĉi tiu periodo — inter 1931 kaj 1938 — Vilmos Bleier eldonis 80 librojn. Se Bleier ankoraŭ estus vivanta, ankaŭ nun li nepre povus doni utilajn konsilojn: kiel oni devas fari la revuo- kaj libroeldonadon en Esperantujo.

Ĉu dum sep jaroj 80 libroj?! Tio ĉi estas pli ol dek volumoj jare! Kiel povis financi tiun entreprenon Vilmos Bleier?

Tion mi ne scias, tio estis rebuso. Ni, la redaktoroj sciis tiom, ke Bleier kapablis interrilatiĝi kun bonhavaj esperantistoj. Ekzemple ni sciis, ke ekzistas sveda esperantisto Eriksson, kiu apogas nin. Sed tion, kiu li estis estus ege malfacila esplori, ĉar multaj Eriksson troviĝas en Svedio. En la redakciaj kunsidoj ofte ni aŭdis, ke "ni ricevis monon de Eriksson, aŭ "ne venis mono de Eriksson".

Revenu al la libroeldonado.

Jes. En 1933 Bleier fondis entreprenon AELA (Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj). Ties esenco estis, ke la anoj de AELA ricevis eksterordinara etpreze — ĝuste pro la jam menciitaj favoraj valutaj cirkonstancoj — la librojn aperintajn sub la egido de AELA. Ni faris por AELA laŭtan reklamon. Ekzemple unu el niaj sloganoj estis:

Librovendo fabela
ne legendo
AELA!

Kiom estis la eldonnombro de la libroj?

Tion mi ne scias, ĉar Bleier matricigis la librojn. Ekzemple mi rememoras, ke el "Lingvo, Stilo, Formo" aperis nur unu eldono, tamen almenaŭ kvin- aŭ sesobla kvanto estis aĉetebla.

Ĉu oni presis la libron ankaŭ en la urbo Vác, kie la revuo Literatura Mondo?

Jes. En la presejo de Vác Gyula Bénik okupiĝis per Esperantaj eldonaĵoj. Ankaŭ li estis esperantisto. Revoki la memoron pri Bénik, por mi estas iom trista, ĉar kiam mi tiutempe vizitis la presejon, Bénik estis ankoraŭ bubo, kaj jen nuntempe mi aŭdis, ke li jam estas pensiulo.

Do de la jaro 1938 la presejo en Vác ĉesigis la preson de esperantaĵoj. Tiam Vilmos Bleier en Italio — se mi bone rememoras en St. Vito al Tagliamento — malkovris malklaran presejon. Sed intertempe komenciĝis la hitlera invado kaj Hitler neniigis eĉ la merkaton. Kie li enestis, oni jam ne povis entrepreni negocon kaj plu vendi librojn. La prezoj altiĝis, kaj la cirkonstancoj malboniĝis ankaŭ en Hungario. Tiam Bleier verkis grandan artikolon, komunikaĵon al la legantaro, kaj li deklaris, ke la aperigo de *Literatura Mondo* kaj la libroeldonado ne estas ligitaj al Hungario, kaj tiuj aperos ankaŭ estonte ie eksterlande.

Poste Vilmos Bleier elmigris. Li iris al Parizo. Lia kunhelpanto Ferenc Braun transloĝiĝis al Honkongo. Mi eĉ ne konjektas kial li elektis ĝuste tiun teritorion. En Honkongo aperis la unua volumo de la romano de Vallienne: "Ĉu li?" Braun en Honkongo estis direktita de Bleier el Francujo. Poste la germanoj invadis ankaŭ Francujon. Mi ne scias kiun faris Braun en Honkongo sen la direkta bastoneto de Bleier. Neniam plu mi aŭdis pri li, pli ĝuste nur tiom, ke li — kiel sagaca homo — en Honkongo fariĝis posedanto de bonprospera entrepreno.²⁶⁷ La revuo li ne povis presigi plu.

Ĉu la redaktorado de la revuo kaj la redaktorado de la libroserio estis la sama?

Jes. Kaj ni faris ĉiam sinkrone la esperantistigon de la libroj, t. n. "bestseller". Ekzemple kiam aperis la romano de Jolán Földes: "La strato de l' fiŝanta kato", post unu monato jam estis prestigebla la Esperanta tradukaĵo.

Kiel vi kapablis tion fari tiel rapide? Kiu estis la tradukinto?

Du personoj tradukis la libron: Somlai kaj Halka. Po dek-dudek paĝojn el la tradukaĵo ili portis al mi por kontrolo, kaj mi ekspedis la manuskriptojn poparte en la presejon.

Ankaŭ la negocata vidpunkto estis grava ĉe tiuj eldonaĵoj?

Kompreneble. Kaj ekzemple kiam aperis la libro de Axel Munthe: "La romano de San Michele" — ĉu tiam estis imageble ne traduki kaj ne eldoni ĝin? Tiu ĉi libro estis tiam unu el la plej favorataj legaĵoj.

Ne estas imageble, ke ĉiuj ekzempleroj de la libro elĉerpiĝis. La nevenditaj libroj eble polviĝas ie en staplo. Ĉu ne?

Kiom multe estis la tuta postrestaĵo, tion hodiŭ jam oni ne povas konstati. Kiam komenciĝis ankaŭ en Hungario la militaj tempoj, Béla Berceli, frato de Vilmos Bleier, luis en la antaŭurbo Kispest etan domon kaj li liveris tien ĉiujn restintajn volumojn — inter ili la antologieton "Naŭ Poetoj"— kaj ili dum la siego de Budapeŝto neniĝis.²⁶⁸

En la tria periodo de Literatura Mondo Béla Berceli estis la eldonisto de la revuo. Ĉu ni povas aŭdi ion pri tiu periodo?

En tiu ĉi periodo Béla Berceli eldonis la poemfabelon "Johano la Brava". La unua eldono aperis same ĉe *Literatura Mondo* en 1923. En la tria periodo *Literatura Mondo* vivis du kaj duonan jarojn, kaj ĉiu ti tempo estis mallonga al tio, ke estigu tia vigla libroeldonado kiel estis en la antaŭa periodo.

Verŝajne, ke Literatura Mondo kaj ties stabo povis leviĝi tien alten, certe efikis ankaŭ tio, ke la redaktaro kaj la kunlaborantoj fiksas antaŭ sin la taskon: riĉigi, poluri la lingvon ĝis literatura nivelo. Ĉu ne?

La literaturan nivelon akcelis ankaŭ tio, ke ĉiu, kiu estis kalkulata en la Esperanta literaturo, verkis por nia revuo.

Kiuj estis el inter la eksterlandaj kunlaborantoj, kies nomoj pluvivis kaj vivas ankaŭ hodiaŭ?

Etas ege malfacile subite vicigi ilin. Nur kelkajn el tiuj, kiuj ankaŭ nome, ankaŭ fizike vivas: Gaston Waringhien, Hilda Dresen, Alec Venture, Henri Vatré, Reto Rossetti, William Auld, ktp. Ili publikigas ankaŭ nuntempe kaj apartenas al la elito. Sed kiu mortis, kiel ekzemple la du fratoj de Zamenhof, Lidja Zamenhof, Helmi Dresen, Nikolao Hohlov ktp, ankaŭ ties nomoj kaj verkoj pluvivas en la Esperanto-literaturo.

Mi dankas vin pro la afablaj respondoj.

267 Bleier sendis sian kunlaboranton Braun al Japanujo serĉi tie presejon.malmultekostan. Intertempe eksplodis la ĉina-japana milito, kio malebligis lian eniron en Japanujon. Fine li restis en Honkongo.

Li fariĝis presejposedanto. Poste li ekloĝis en Nord-Amerikon.

268 Vd p.23-24.

AL LA BUDAPEŝTA SKOLO

Okaze de l' Kongreso
jen al Budapeŝto
el usona foro
per poŝta ekspreso
la saluta gesto
de sam-sona koro.

Vi en via ĥoro
kantas tre madjare —
akorde kaj are,
dum ni en Usono
kantetas nur ŝpare,
kun pen' kaj sen gloro,
en ... misunisono.

Por la diapazono
de la fama skolo
harpon de Eolo
kun elkora dezir':
Vivu ĝia rolo
per liuto kaj lir'
por mondliteratur':

Ho, se ni povus nur,
sur la kontinento
de la senidento
de sinteza kultur',
sen brustbatoj de pento
elsorĉi kun sento
flaŭron poezian —
genion Baghyan,
Kalocsayon sian,
aŭ almenaŭ ekkoni
la propran Tárkony!

Julius BALBIN
1966

44 44 44 43 43 43 43

Karlo BODÓ
1903-1963

Paŭlo BALKÁNYI
1894-1977

Julio BAGHY
1891-1967

Paŭlo VARSÁNYI
1902-1990

Vilmos BLEIER
1903-1940

Ferenc SZILÁGYI
1895-1967

Kálmán KALOCSAY
1891-1976

Béla BERCELI
1905-1986

Ludoviko TOTSCHÉ
1902-1978

Paŭlo BALKÁNYI
1894-1977

Paŭlo LENGYEL
1868-1932

Gaston WARINGHIEN
1901-1990

13.4 Bio-bibliografiaj notoj de la stabo de Literatura Mondo

Baghy, Julio/Gyula (ps. Paĉjo; Jobo; by) (1891-1967).
Kunfondinto kaj ĝis 1933 ĉef-kunredaktoro de *Literatura Mondo*.

Li naskiĝis en Szeged (Hungarujo) la 13-an de Januaro 1891. Lia patro Gyula Baghy estis drama aktoro, lia patrino Maria Bodroghy estis teatra sufloristino. Lia praavo same estis aktoro. La familian tradicion daŭrigis Gyula. Li ankaŭ reĝisoris en diversaj teatraĵoj. Post la unu mondmilito forpasis lia edzino. En 1924 li reedziĝis al Erzsébet Zsiros (1891-1977). Ilia filo estas Gyula Baghy.

Esperantisto de 1911. En la Orient-Siberia milit-kaptitejo — kie li devis pasigi ses jarojn dum- kaj post la unua mondmilito ĝis 1920 — li gvidis E-kursojn por la diversnaciaj militkaptitoj. Kune kun Mihály Sárosi organizis teatran grupon por distri kaj iom konsoli la samsortanojn. Reveninte Hungarion li fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Esperanta movado. Li forlasis la aktoran profesion kaj dediĉis sian talenton kaj energion al la Esperanta movado kaj verkado. En 1921 li fondis la E-klubon ERA (Esperanto-Rondo Amika), gvidis multajn E-kursojn ankaŭ eksterlande kiel Cseh-instruisto. Li estis ankaŭ unu el la plej elokventaj oratoroj en Esperanto. Dum pluraj Universalaj Kongresoj li estis aktoro kaj reĝisoro de Esperanto-prezentadoj. Li iniciatis, ke la 15-a de decembro estu "Tago de la Esperanto-libro".

E-postenoj: Ano de la *Lingva Komitato* 1924/48. Membro de la *Akademio de Esperanto* 1924/1967, vicprezidanto 1938/50. *Hungarlanda Esperanto-Societo*: komitatano 1921/24, 1928/31, 1938/47, kunprezidanto 1947/50, honora membro 1928/50. Vicprezidanto de *Hungara Esperanto-Federacio* 1936/44. Prezidanto de la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* 1955/60, komitatano 1960/67. Prezidanto de *Hungara Esperanto-Asocio* 1960/65.

Ĉefaj verkoj: PRETER LA VIVO (poemaro, 1923); VIKTIMOJ (romano 1925); PILGRIMO (poemaro, 1926); DANCU MARIONETOJ (noveloj, 1927); MIGRANTA PLUMO (noveloj kaj poemoj, 1929); HURA! (romano, 1930); PRINTEMPO EN LA AŬTUNO (rakonto, 1931); VERDAJ DONKI°OTOJ (romano kaj karikaturoj 1933); SUR SANGA TERO (romano,

1933); LA VAGABONDO KANTAS (poemoj, 1933); LA TEATRA KORBO (skizoj, 1934); LA VERDA KORO (romaneto por komencantoj, 1937); SONGĜE SUB POMARBO (versdramo, 1956); KOLOROJ (novelaro, 1960); ĈIELARKO (poemoj, 1966); AŬTUNA FOLIARO (poemoj, 1970); EN MASKOBALO (dramoj, 1977); ESZPERANTÓ NYELVKÖNYV (E-lernolibro por hungaroj, 1961). Liaj verkoj estas tradukitaj al 13 lingvoj.

Distingo: *Por Socialisma Kulturo* 1960.

En Miskolc-Tapolca strato, en Nagybakónak E-fonto portas lian nomon.

Li mortis la 18-an de Marto 1967. La korpan restaĵon de Julio Baghy en 1974 la ĉefurba gvidantaro el la antaŭa ripozloko translokis en la Nacian Panteonon, kie li, la "Homa homo" ricevis honorlokon inter eminentaj verkistoj. Sur lia iama loĝdomo memortabulo anoncas:

EN ĈI TIU DOMO VIVIS KAJ VERKIS DE 1917 ĜIS 1966
JULIO BAGHY
INTERNACIE REKONATA ELSTARA FIGURO DE LA
ESPERANTA LITERATURO.

Balkányi, Paŭlo/Pál (ps.: Vera Nurhom; Albin Kálpay; Oĉjo Paŭlo; P. B.; V. N.) (1894-1977).

Li staris ĉe la lulilo de *Literatura Mondo* kiel kunfondinto, kaj estis ano de la *Redakta Komitato* en la unua periodo.

"Mi naskiĝis la 11-an de Marto 1894 en Budapeŝto. Mia patro d-ro Miksa Balkányi estis kuracisto, mia patrino estis Janovits Izabella. En 1929 mi edziĝis al Ilona Benkő. Mi havas du filojn: György kaj Imre. Kiel bankoficisto mi laboris de 1920 en la *Hungara Ĝenerala Kreditbanko*, poste en la *Hungara Nacia Banko*. Mi pensiĝis en 1957. En 1914-1918 mi partoprenis en la unua mondmilito, en 1919 mi soldatservis kiel "ruĝa soldato".

Estas hazarde, ke mia patro en 1909 hejmenportis *Ŝlosilon de Esperanto*. Mi entuziasmiĝis unue pli la relative facila lingvo, sed poste, studante ampleksajn lernolibrojn kaj diversajn broŝurojn, mi ekkonis ankaŭ la ideon de la zamenhofa lingvo kaj mi fariĝis ĝia adepto..." — oni legas en la membiografio de Paŭlo Balkányi.

Lia esperantista kariero:

Paŭlo Balkányi de 1912 dum pli ol ses jardekoj laboris energie kaj diversflanke por la disvastigo de Esperanto. Kiel "fanatika obsedito de la Internacia Lingvo", li eluzis ĉiun eblon, ĉiun terenon kaj rimedon fari propagandon al Esperanto. Kiam li devis soldatiĝi dum la unua mondmilito, ankaŭ en la batalfronto varbis al Esperanto.²⁶⁹ Jam antaŭ la unua mondmilito en 1912 li aranĝis "propagand-promenon". Ĉirkaŭ 30 samideanoj kun flagetoj grupe marŝis tra la plej frekventitaj urbopartoj disdonante E-flugfoliojn. En 1913 li helpis la organizadon de HESL. Li estis la unua, kiu en Hungario aranĝis ekspoziciojn en lernejoj (1913) uzante amason de afiŝoj, libroj, ilustritaj poŝtkartoj akiritaj per lia ampleksa internacia korespondado. Oni uzis en Hungario unuafoje Esperantlingvan poŝtan stampilon en la ekspozicio de filatelistoj aranĝita de Balkányi en 1918. En 1919 dum la *Konsilio Respublika* Paŭlo Balkányi, faris propagandajn prelegojn, eldonigis flugfoliojn, afiŝojn (senditajn ankaŭ eksterlanden) por konigi la pravon de la *Proleta Hungario*. Li tradukis al Esperanto la kajeron de Béla Kun: "Kion volas la komunistoj?" Pro tio la nova reĝimo enkarcerigis lin. Liberigis lin tiutempa E-gvidanto Aŭgusto Marich, kiu estis polic-officiro.

Inter 1918-1928 li aranĝis ĉiujare E-standon en la *Budapeŝta Internacia Foiro*. La *Ĉefurba Fremdultrafika Oficejo* je lia iniciato uzis grandskale Esperanton, eldonis multajn afiŝojn, prospektojn kaj aliajn reklamilojn en Esperanto. Li reprezentis la *Budapeŝtan Komercon Ĉambron* en la konferencoj de Venezia, Parizo kaj Frankfurt. En la 20-aj jaroj li fondis regulan gazetservon por Esperanto. Li sendis informojn ne nur al la E-gazetoj, sed ankaŭ al la hungaraj ĵurnaloj, en kiuj ofte aperis sciigoj pri Esperanto.

De 1929 Paŭlo Balkányi organizis tre viglan Esperanto-movadon inter la skoltoj. Multe li laboris pro la sukceso de la skolta *Ĵamboreo* aranĝita en Gödöllő (Hungario) en 1933. Ĉi-okaze li verkis *Esperantan Skolthimnon* kies muzikon komponis K. Kalocsay. Balkányi jam junaĝe — kiel *Verdskolta general'* fariĝis ĉies "Oĉjo Paŭlo".

Dum la intermilitaj jaroj li estis la motoro de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* kaj de la *Komitato por Disvastigo de Esperanto*. Li gvidis multajn kursojn, prelegis, aranĝis kunvenojn ktp. Paŭlo Balkányi estis ofta rolanto en la literaturaj programoj de la laboristaj Esperanto-grupoj. Li estis elstara batalanto de la Esperanta pacmovado, hungara reprezentanto de MEM, konstanta kunlaboranto de *Paco*. Li fondis kaj vivtenis E-grupojn. En 1921 li jam trovis hejmon por la nemal multe suspektata Esperanto en la strato Eötvös. Li estis kunfondinto, kaj dum 20 jaroj gvidanto de la *Grupo Konkordo*.

Balkányi alte taksis la signifon de la E-literaturo. Li eldonis proprariske plurajn verkojn, inter ili la poemareton de Kalocsay: MONDO kaj KORO; E. Heltai—E. Makai: LA PAĜIO DE L' REĜINO; G. Gárdonyi: DU KOKCINELOJ; la dramon de F. Karinthy: MORGAŬ MATENE (tradukoj de Kalocsay) ktp. Kvankam lia nomo ne estas legebla sur librotitolpaĝoj, tamen liaj verkaĵoj plenigus dikan volumon. Li verkis recenzojn, kelkajn novelojn, rakontojn kaj poemetojn (ĉefe por infanoj). Sukcese li tradukis multajn konatajn popolkantojn. Sennombraj raportoj (proks. mil) aperis el lia plumo en la plej diversaj revuoj dise en la tuta mondo. Trafe salutis lin A. Logvin:

Ĉu estas en la mond' ĵurnal'
sen via artikolo, Pál?!
Kiel Abel', kiel formik',
Fervore agas vi, Amik'
Gratulon, kara nia Pál,
Saluton al vi por final'!

Li kontribuis al la ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO (1933/34), ORA LIBRO (1937), GVIDLIBRO II. (1966).

E-postenoj:

Komitatano de *Hungarlanda Esperantista Societo Laborista* 1918/19. Ĉefsekretario de *Propaganda Komitato por Lingvo Internacia* 1918/22. UEA-ĉefdelegito 1921/36, 1947/50. Vicprezidanto de *Hungarlanda Esperanto-Komitato* 1955/58. Komitatano de *Hungara Esperanto-Asocio* 1960/65, prezidano 1963/65.

Distingoj:

Por Socialisma Kulturo 1962. *Ora insigno de la Landa Pac-konsilantaro* 1969; *Honorsigno de Bulgara Esperanto-Asocio ora grado* 1969; *Honorsigno de Mondpaca Esperantista Movado*.1972. Honora membro de UEA 1947.

La vigla Esperanto-movado en Hungario inter la du mondmilitoj estas dankebla ankaŭ al la elstara propagandisto Paŭlo Balkányi.

Paŭlo Balkányi per multaj fotoj, indikoj, rememoroj kontribuis al OMAĜE.

Li mortis la 25-an de Februaro 1977. Lia cindro estas lokita en la tombejo Budapeŝt-Farkasrét, kolumbario E 956.

269 Vd p. 38.

*

Bayer, Adalberto/Béla (?)

Ano de la Redakta Komitato ĝis Junio 1923.

Du noveloj en la traduko de A. Bayer: E. Heltai: *Gertie* (LM 1922/3-5); F. Herczeg: *La bubo* (LM 1923/35-36).

(Pliaj indikoj mankas).

*

Bénik, Gyula (1911-1986).

Presisto de *Literatura Mondo* en ĝia dua periodo.

Li naskiĝis en Budapeŝto. Li lernis Esperanton kiel juna presisto per aŭtodidakta maniero. Poste, kiam li ricevis por laboro presi la revuon *Literatura Mondo*, por firmigi sian lingvoscion, li vizitis E-kurson, kiun gvidis Ferenc Szilágyi en la urbo Vác. En la postaj jaroj ankaŭ li gvidis multajn Esperanto-kursojn, estis hungarlanda peranto de la gazeto *Esperantista Vegeterano*. Li aniĝis al la *Hungaria Esperantista Societo Laborista*, partoprenis en ĝian organizadon. Li kunfondis kaj estis prezidanto de la Esperanto-grupo "*Danubkurbigo*". Post la dua mondmilito kaj post la revolucio (1956) li reorganizis la Esperantan movadon en Vác.

Dum lia presista agado li kunlaboris kun J. Baghy, K. Kalocsay, K. Bodó kaj V. Bleier. La presprovaĵojn la presejo sendis perpoŝte al Budapeŝto, sed ĉe la enpaĝigo ĉiam ĉeestis iu el la redaktoroj, plejofte Kalocsay, foje-foje Baghy aŭ Bodó. Li kompostis dum certa tempo la revuojn: *Hungara Mondo*, *Literatura Mondo*, *Hungara Fervojista Mondo*, *Hungara Esperantisto*, *Hungara Vivo*, *Eszperantó Magazin*.

Gravaj eldonaĵoj de *Literatura Mondo* naskiĝis kun lia kontribuo: HUNGARA ANTOLOGIO (1933), ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO (1933/1934), ĈE°OSLOVAKA ANTOLOGIO (1935), SVISA ANTOLOGIO (1936/1937), ORA LIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO (1937), GVIDLIBRO I. (1964). Ne unufoje okazis (kiam la eldonisto Bleier ne povis tuj pagi al la presejo), ke la ĉefo entreprenis la mendon, se la kompostadon faras Bénik krom la normala labortempo kaj sensalajro. Kvankam Bleier promesis apartan premion al Bénik, sed li malofe povis plenumi la promeson, ĉar li vivis de tago al tago.

La preseja uzinestro Gyula Bénik pensiĝis en 1971. Li laboris dum pli ol kvar jardekoj en la metio de Gutenberg.

Li estis membro de *Hungara Esperanto-Asocio* ekde 1960, komitatano 1963/86, honora membro ekde 1981.

Lia distingo: *Memormedalo de la Landa Packonsilantaro* 1976; *Pro Sindikata Agado ora grado* 1980.

Gyula Bénik per rememoro kontribuis al OMAĜE...Vd en 1-a vol. p. 88.

Li mortis la 14-an de februaro 1986.

*

Berceli/Bleier, Béla (1905-1986).

Refondinto de *Literatura Mondo* en 1947.

Li naskiĝis en Újpest (antaŭurbo de Budapeŝto). Lia nomo ĝis 1947: Béla Bleier. Li estis mekanikisto. En 1950/56 servis en la armeo kaj pensiĝis kiel generalo. Ekde 1957 ĝis 1969 li estis ĝenerala direktoro de la *Radio kaj Elektra Entrepreno de Orion* kaj tiu de *Elektromezuril-Fabriko Ganz*.

Li estis frato de Vilmos Bleier. Ili esperantiĝis kune en 1922 kaj fondis laboristan Esperanto-grupon en Újpest.

Béla Berceli pli ol 60 jaroj agadis en la unuaj vicoj de la Esperanta movado, ĉefe en la *Hungaria Esperantista Societo Laborista*. Post la dua mondmilito li revigligis la E-movadon en Hungario kaj en 1947 multe helpis la unuiĝon de la du Esperanto-societoj HESL kaj HES. La unuiĝo el organiza kaj politika vidpunkto estis tre grava. En 1961 li multe kontribuis al la fondo de la *Hungara Esperanto-Asocio*.

La tria periodo de *Literatura Mondo* (1947-1949) estas dankebla al Béla Berceli. Li fervore daŭrigis la laboron de la mortinta, fama frato Vilmos. Li aperigis la poemfabelon de S. Petőfi: JOHANO LA BRAVA tradukita de Kalocsay. La unua eldono de tiu ĉarma epopeeto aperis same ĉe *Literatura Mondo* en 1923.

Liaj E-postenoj: En HESL: Vickomitatano 1929, komitatano en 1930, sekretario 1946/49, redaktoro 1949/50. Komitatano de HEA 1965/77, ĉefsekretario 1965/74. UEA komitatano por HEA 1967/77.

Distingo: *Por Sindikata Agado, ora grado* 1974, 1985.

Li estis enterigita la 5-an de Septembro 1986 en la tombejo Budapest-Farkasrét, parcelo 4.

*

Bleier, Vilmos (1903-1940).

Eldonisto de *Literatura Mondo* en ĝia dua periodo.

Frato de Béla Berceli. Li naskiĝis en Újpest (antaŭurbo de Budapeŝto) la 14-an de Majo 1903. El inter la kvin geknaboj de la proleta familio, Vilmos kaj Béla fariĝis la plej bonaj amikoj. Jam en infanaĝo ili ne nur ludis, sed ankaŭ lernis kaj legis ĉiam kune. Vilmos studis en teknika ĉeflernejo kaj ricevis atestilon kiel seruristo. Poste li estis foira komercisto.

Li lernis Esperanton en la *Laborista Hejmo* en Újpest kaj de tiam ĝis 1930 estis aktivulo de la laborista movado. Li kunfondis laboristan Esperanto-grupon en Újpest.

Inter 1924 kaj 1930 li estis dungata, salajrata oficisto — administranto, propagandisto, librotenisto, eldonisto kaj kasisto — ĉe *Hungaria Esperantista Societo Laborista*.

HESL en 1928 aperigis kantolibreton NI KANTU! en traduko de Kalocsay. Pro kelkaj kantotekstoj la polico tuj konfiskis la libron kaj la respondecan eldoniston Bleier oni punis unumonata prizono.²⁷⁰

Li neniam dorlotis la ambicion de verkisto aŭ poeto, sed li estis ne nur literaturamanto sed ankaŭ bona konanto de la mondliteraturo. Li havis vastajn sciojn ensorbitajn aŭtodidakte.

La duan periodon de *Literatura Mondo* ebligis la talento kaj ĉefe organiza kapablo de Vilmos Bleier. De 1930 li estis administranto, teknika aranĝanto kaj ĉefa posedanto de la revuo kaj eldonejo. Krom la talento Bleier havis optimismon kaj kapablon kvazaŭ transplanti sian optimismon al aliaj, kaj tio helpis lin akiri kelkajn — vere nur kelkajn — mecenatojn, kiuj emis oferi certan monon sur la altaro de Esperanta literaturo. Post sesjara agado en HESL, li ekvidis bonajn eblecojn de libroeldonado, kiun li ne povis efektiviigi en la kadroj de HESL.

Li estis geniulo en la komerco. Estis lia devizo: *Ne sufiĉas eldoni librojn, oni devas ilin vendi per ĉiuj eblaj klopodoj*. En 1932-1933 li preleg-vojaĝis en kvar landoj kaj varbis libro-aĉetantojn kaj abonatojn por LM. Cetere li estis bona kaj lerta oratoro.

Mispaŝon faris Bleier — rakontis Kalocsay — ke li dissendis la HUNGARAN ANTOLOGION al multaj esperantistoj kun la peto, ke ili gustumu ĝin, kaj se ĝi plaĉas, ili sendu ĝian prezon, se ne plaĉas, ili resendu la libron, aŭ postkarte sciigu pri la rifuzo, ĉar tiam la eldonejo sendos al ili la sendokostojn. Multaj ne respondis, kaj retenis la libron sen pago. Troviĝis iu, kiu sendis la rifuzkarton kaj poste retenis ankaŭ la ricevitaĵajn sendokostojn. Post la oka atentigo Vilmos Bleier publikigis nomojn de la 75 negativuloj. Kompreneble la afero vekis grandan eĥon ne favoran por *Literatura Mondo*.

Vilmos Bleier en la libroeldonado estis aŭdaca. Ekzemple li eldonis la verkon de Peter Peneter: SEKRETAJ SONETOJ, kiu tiutempe estis tre riskema entrepreno. La eldono kaj disvastigo de tiaspecaj literaturoj estis "delikto oficiale persekutenda" kaj severe punenda.²⁷¹

Nia literaturo ŝuldas multon al la rimarkinda komerca kapablo, neĉiutaga energio de Bleier, kiu, spite al ĉiaj financaj malhelpoj, sukcesis eldoni la plej gravan beletran revuon kaj 80 volumojn. Li estis kunredaktoro de la ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO (1933/34), ORA LIBRO DE LA ESPERANTA MOVADO (1937), ARGĜENTA DUOPO (1937).

Liaj E-postenoj en *Hungaria Esperantista Societo*: Protokolisto 1923, komitatano 1924, vickomitato 1929, komitatano 1930.

Vilmos Bleier en 1938 jam sentis la alvenon de la milita uragano. Li elmigris en Francujon. En Parizo li malsaniĝis je meningito kaj kuŝis en hospitalo, kiam la 14-an de Junio 1940 la hitleraj trupoj marŝis en Parizon. La hospitalo tute malpleniĝis, ĉiu fuĝis kaj lasis la gravajn malsanulojn en la hospitalo. La stato de Bleier malboniĝis kaj mortis la 18-an de Junio. Enterigis lin lia amiko la 21-an de Junio. Nun li kuŝas en la tombejo "Cimetière Parisien de Thiais 82. division, 20. ligne, No 27."

270 Vd en la 1-a vol. p. 57; en la 3-a vol. p. 34-36.

271 Vd en la 2-a vol. p.17-22.

*

Bodó, Karlo/Károly (1903-1963).

Redakciano de 1924, responda redaktoro de *Literatura Mondo* en ĝia dua periodo.

Li naskiĝis en Monor. Li estis oficisto. Esperantisto de 1921.

Karlo Bodó estis eminenta tradukisto kaj transplantis al Esperanto valorajn verkojn de la hungara literaturo. Li debutis kiel novel-tradukisto en *Literatura Mondo* dum ĝia unua periodo. Per 12 noveltradukoj li kontribuis al HUNGARA ANTOLOGIO. Liaj tradukoj en 1928-1930 aperis en *Hungara Heroldo*.

Dum la preparado de HUNGARA ANTOLOGIO li vizitis ĉe eminentaj verkistoj (Babits, Karinthy, Kosztolányi, Móricz ktp.) kaj sukcesis ilin amikigi al Esperanto. Dank' al Bodó, Karinthy eĉ lernis Esperanton kaj fariĝis prezidanto de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* en 1932-1938.

Kvankam Bodó estis membro de HES, tamen li ofte partoprenis en la literaturaj programoj de la laboristaj Esperanto-grupoj.

Liaj ĉefverkoj: F. Karinthy: *NORDA VENTO* (novelaro, trad. 1926); M. Babits: *LA CIKONIKALIFO* (romano, trad. 1929).

"Kio karakterizas liajn laborojn, — skribis W. B. Johnson — tio estas unue, trafgusta elekto de tradukindaj verkoj, kaj due naturstila rekreo de la originalo, tiel ke ĝi ŝajnas nova originalo Esperanta."²⁷² La tradukoj de Bodó ricevis tre favorajn eĉ entuziasmajn laŭdojn de la recenzistoj, rekonon de la Akademio. Li fariĝis membro de la *Lingva Komitato*.

Post la dua mondmilito Bodó eksilentis. Li retrovis la vojon al Esperanto en 1961, kiam aperis la *Hungara Vivo*. Li komencis denove interrilatiĝi kun literaturaj rondoj kaj esperis eblon de libroeldono.

Jen la portreto de Bodó pentrita de Kalocsay en la RIMPORTRETOJ.

Bodó — aspektas li infano,
Verŝajne li gluis barbon,
Kiam li faris voĉo-varbon,
Esti Lingvo-Komitatano.

El Karinthy kun forta mano
Traduke falĉis tutan garbon,
Bodó aspektas kiel infano,
Verŝajne li algluis barbon.

En la kolora stilfontano
Kuraĝe miksas li la farbon
Kaj rampis li sur laŭro-arbon
Per dono de l' Babits-romano.

Bodó — aspektas kiel infano.

Karlo Bodo subite kaj tute neatendite mortis pro koratako la 21-an de Januaro 1963.

272 En: Enciklopedio de Esperanto p. 56-57.

*

Hevesi, Endre (1902-1984).

Sekretario de la Redakta Komitato en 1923 de Aprilo ĝis Aŭgusto.
Li estis ĵurnalisto.

Endre Hevesi estis aŭtoro entute du mallongaj rakontoj kaj unu kanteto aperintaj en *Literatura Mondo* (1923/75; 83-84).

Li estis kunludanto de la Kabareto de *Literatura Mondo* prezentita dum la 15-a UK en Nürnberg. Baldaŭ li kabeigis.

Li mortis la 22-an de Oktobro 1982.

Kalocsay, Kálmán/Kolomano (ps. ĝenerale konataj: Kopar; Alex Kay; Malice Pik; C. E. R. Bomy).²⁷³ (1891-1976).

Ĉefredaktoro de *Literatura Mondo* en ĝiaj tri periodoj; spirita gvidanto de la *Budapeŝta Skolo*.

Medicinisto (infektologo). Titolita universitata profesoro. Doktoro de la medicina scienco.

Li naskiĝis la 6-an de Oktobro 1891 en Abaújszántó. Lia patro D-ro Kálmán Kalocsay estis tribunala juĝisto, lia patrino Jolán Panda mortis junaĝe en 1893. La patro de Kálmán en 1895 reedziĝis al Margit Benyó. El tiu edzeco naskiĝis du infanoj: Margit kaj László.

En 1929 Kalocsay edziĝis al Margit Vangel; eksedzino de majoro F. Szelvényi. Ŝian 9-jaran filineton ne adoptis Kalocsay.

Kiam en 1914 eksplodis la unua mondmilito, Kalocsay estis medicinstudento, sed ankaŭ li devis soldatiĝi. Li pasigis 20 monatojn sur la batalkampo. Entute li plenumis soldatan servon dum tri jaroj. Lia neĉiutaga talento kaj energio ebligis daŭrigi la medicinajn studojn ankaŭ en la soldata uniformo. La medicina diplomo de Colomannus Vincentius Kalocsay datumiĝas 1916.05.16. Li laboris de 1920 en la *Hospitalo Szent László*, kiu servis por infektaj malsanuloj. Li akiris vastan renomon kiel fakverkisto kaj specialisto pri infektaj malsanoj. Pro siaj meritoj en la medicina laboro li ricevis kvar ŝtatajn distingojn. Kalocsay laboris en la sama laborloko 46 jarojn. Li emeritiĝis en 1966.

Lia Esperanto-kariero:

En 1911 ekkonante Esperanton li dediĉis sian talenton al la nobla ideo de la zamenhofa lingvo kaj ĝismorte estis ĝia senlaca kultivanto. Kiel poeto, fidela tradukisto, eseisto, redaktoro, lingvisto, gramatikisto, perfekta konanto de la spirito de Esperanto, Kálmán Kalocsay jam en sia vivo ricevis plenan rekonon de la Esperanto-mondo.

Liaj ĉefaj verkoj:

Originalaĵoj:

MONDO kaj KORO (poemoj, 1921); RIMPORTRETOJ (rondelformaj poemoj trafe karakterizas 58 famajn esperantistojn, 1931); STREĈITA KORDO (la literatoroj konsideras ĝin kiel mejloŝtonon de la Esperanta poezio, 1931); SEKRETAJ SONETOJ (sub pseŭdonimo Peter Peneter, 1932); IZOLO (poemaro, presita en 1939, aperigita en 1977); EZOPA SAĜO (verse reverkitaj fabloj, 1956). Postmorte aperintaj verkoj: LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO (erotika ĉefverko de la Esperanta literaturo, 1990); VERSOJN ONI NE AĈETAS postlasitaj poemoj, 1992). Li prilaboris la ĝis tiam mankantan E-prozodion kaj per tio malfermiĝis nova horizonto en la Esperanta liriko. Al kelkaj poemoj Kalocsay mem komponis melodion. 52 K- poemoj estas tradukitaj al 13 lingvoj.

Poemtradukoj:

KANTANTA KAMPARO (101 popolkantoj, 1921); ETERNA BUKEDO (traduko el 22 lingvoj, 1931); JOHANO LA BRAVA de S. Petőfi (1923, reviziita eldono 1948); NI KANTU! (popolkantoj 1928); LA TRAGEDIO DE L' HOMO de Madách (ĉefverko de la hungara literaturo, 1924, reviziita eldono 1965); ROMAĴ ELEGIOJ kaj LA TAGLIBRO de Goethe (1932); HUNGARA ANTOLOGIO (redakto kaj la plejan parton de la poemtradukoj, 1933); INFERO de Dante (unua parto de la DIA KOMEDIO, 1933); La FLOROJ DE L' MALBONO de Baudelaire (kun G. Waringhien kaj aliaj, 1957); KANTOJ kaj ROMANCOJ de Heine (kun G. Waringhien, 1969); Tri Shakespeare-verkoj: REĜO LEAR (1966); SOMERMEZNOKTA SONGO (1967); LA TEMPESTO (1970); LIBERO kaj AMO (elektitaj poemoj de S. Petőfi, 1970); TUTMONDA SONORO (poezia antologio tradukita el 30 lingvoj, 1981).

Lingvistikaj verkoj:

LINGVO, STILO, FORMO (1931); PARNASA GVIDLIBRO (kun Waringhien kaj R. Bernard, 1932, reviziita kaj kompletigita eldono 1968) PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO (kun G. Waringhien, 1938, 1958-1964); RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN (1966); VOJAĜO INTER LA TEMPOJ (1966); DOMFABRIKO — 6000 FRAZEOLOGIAJ ESPRIMOJ HUNGARAJ-ESPERANTAJ (kun A. Csiszár, 1975).

Prozaj tradukoj:

LA PAĜIO DE L' REĜINO (Komedio de E. Heltai–E. MAKAI, 1922); DU KOKCINELOJ; LA MONTRO (noveloj de G. Gárdonyi, 1923); MORGAŬ MATENE (dramo de F. Karinthy, 1923); A. Hekler: ARTHISTORIO I. (1934). VIVO DE ARNALDO Biografia verko de B. Mussolini, 1934); ROZINJO (novelo de Gy. Török, 1938).

Ĉefaj E-postenoj:

Hungarlanda Esperano-Societo: diversaj postenoj de 1920, prezidanto 1938/1941, honora prezidanto 1943/1950; vicprezidanto de la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* 1955/1960; komitatano de *Hungara Esperanto-Asocio* 1960/69, honora prezidanto 1969/76.

Membro de la *Lingva Komitato* 1922/48; membro de la *Akademio de Esperanto* 1949/76.

Distingoj:

Por Socialisma Kulturo 1960. *Honormedalo de Hungara PEN-Klubo* 1970. *Ordeno de Laboro, ora grado* 1971.

Honora membro de UEA. *Pro Esperanto* 1983 (postmorte).

Li mortis la 27an de februaro 1976. Lia cindro estas lokita en la familia kriptoj en la urbeto Máriabesnyő.

Krom lia giganta verkaro strato en Abaújszántó kaj en Miskolc, du memortabuloj en Máriabesnyő, E-fonto en Nagybakónak, en la naskiĝurbeto Memor-ĉambro kaj publika bronza busto anoncas la nomon de Kálmán Kalocsay.

273 En: SENVUALE — Listigitaj pseŭdonimoj de Kalocsay kun klarigoj. Budapest: Ada Csiszár, 1999. 25 p.

*

Lengyel, Paŭlo/Pál (1868-1932).

Redakciano de *Literatura Mondo* en ĝia unua periodo.

Li naskiĝis en Szabadka (nun Subotica, Jugoslavio) la 1-an de Aprilo 1868. Lia patro estis gimnazia profesoro. Kvarjara li fariĝis tute orfa, edukis lin lia avino. La gimnaziajn studojn li faris en la urbo Pécs. En 1883 li iĝis presisto kaj en la urbeto Szekszárd li instalas malgrandan presejon.

En 1897 li aĉetis la unuan hungaran E-lernolibron verkitan de Ábel Barabás kaj post du tagoj li sendis leteron al la sola, tiam ekzistanta Esperanta-revuo *Lingvo Internacia*, tiam eldonita en Svedio. Li abonis la gazeton kaj komencis korespondadon kun ĝia redaktoro Paŭl Nylén kaj kun aliaj diverslandaj — ankaŭ famekonataj — esperantistoj.

En la fino de 1899 pro financaj kaŭzoj la *Lingvo Internacia* staris jam en la rando de bankroto. Por savi la gazeton Paŭlo Lengyel entreprenis la eldonon, presadon, kompostadon en Szekszárd. La redaktoro restis Paŭlo Nylén. La gazeto baldaŭ havis preskaŭ sufiĉe da abonantojn kaj ĝi povis aperi ĉiam regule. Nylén baldaŭ la redaktadon transcedis al Lengyel kaj tiel li fariĝis ĉionfarulo: redaktoro, eldonanto, presisto, administranto kaj kompostisto. En 1902 la redaktan laboron transprenis Paŭl Fruictier. En 1903 Lengyel kompletigis la gazeton per 12-paĝa aldonaĵo titolitan *Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia*.

P. Lengyel en 1904 kun sia familio kaj la preshelpanto Kajetano Seper transloĝiĝis en Parizon. En la sama jaro kun Cart, Fruictier kaj aliaj li fondis eldonejo-presejon: *Presa Esperantista Societo*. Poste Viktor Polgár aĉetis la presejon, la redaktoro de la gazeto fariĝis Th. Cart. La societo kaj la revuo ekzistis ĝis la unua mondmilito 1914.

Kiam eksplodis la milito en 1914 ĉiuj Germanoj, Aŭstroj kaj Hungaroj loĝantaj en Francujo estis internigitaj dum la daŭro de la milito. Ankaŭ P. Lengyel kun sia familio estis en malliberejo, oni konfiskis lian tutan havaĵon.

a mallibereco finiĝis en 1919 kaj oni transportis lin en Budapeŝton. Tie li laboris kiel korektisto en granda presejo.

Lia literatura agado:

Lia unua verketo: "*Malhelpinta bigamio*" aperis en unu el la fruaj numeroj de *Lingvo Internacia*. Lia novelo "*Regno de l' Homoj*" gajnis la unuan premion de literatura konkurso dum UK en Barcelono 1909. La premion Zamenhof transdonis al li. Li redaktis la gazeton *Juna Esperantisto* (1909-1914).

Liaj libroforme aperintaj verkoj:

LIBRO de l' HUMORAĴO (1899); ESZPERANTÓ NYELVTAN és SZÓTÁR (kunredakto, 1903); Á. Abonyi: MALLUMAĴO (rakonto, trad. 1906); LA KALENDARO (scienca verketo, 1907); MAGYAR-ESZPERANTÓ – ESPERANTO-MAGYAR SZÓTÁR (1908); Zamenhof: FUNDAMENTO de ESPERANTO (trad. por hungaroj, 1909); ESZPERANTÓ (malgranda lernolibro kun ekzercoj de K. Kalocsay 1921).

En 1905 li estis elektita ano de *Lingva Komitato* kaj poste membro de la *Akademio de Esperanto*.

Li mortis la 3-an de oktobro 1932.

La 4-an de oktobro 1986 en Szekszárd (Hungario) strato Babits 16 estis inaŭgurita dulingva memortabulo sur la muro de la iama presejo:

En ĉi tiu domo funkciis la presejo
de PAŬLO LENGYEL, kie
li eldonis la Esperantlingvan
gazeton "LINGVO INTERNACIA"
inter 1901-1904

*

Szilágyi, Ferenc (ps. Sila, Silabo, Fersil, Sife, F. S.). (1895-1967).

Kunredaktoro de *Literatura Mondo* en ĝia dua periodo.

Li naskiĝis la 1-an de Februaro 1895 en Budapest. Ŝtatoficisto. Doktoro pri juro. Lia edzino: Róza Daniellisz: (? -1972).

Esperantisto de 1924. Komitatano de HESL 1925. De 1929 li agadis en la *Budapeŝta Grupo de Hungarlanda Esperanto-Societo*. Vicprezidanto en 1932. Li organizis, prelegis, gvidis multajn kursojn ankaŭ eksterlande. Al la Cseh-metodo li donis novajn elementojn, ekz. li uzis lumbildojn kiel helpilon, per tio estiĝis memstara "Szilágyi-metodo". Sekretario de la *Belartaj Konkursoj* de UEA 1953/1957. Membro de la *Lingva Komitato*, poste ano de la *Akademio de Esperanto* 1930/1967.

Honora membro de UEA.

Liaj ĉefaj verkoj:

POEMARO EN HUNGARLANDO (tradukoj, 1929); LA SIMPLA ESZPERANTÓ (lernolibro, 1931); TRANS LA FABELOCEANO (originalaj rakontoj, 1931/32); ELLERNU! (lernolibro, 1932); LA PENTROARTO EN LA MALNOVA HUNGARIO (traduko, 1932); Kunlaboro en HUNGARA ANTOLOGIO (1933); Kunlaboro en ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO (1933-1934); Kunredaktoro de ARĜENTA DUOPO (1937); Originalaj poemoj en DEKDU POETOJ (1934); HUMORA NOVELARO (tradukoj, 1944); LA GRANDA AVENTURO (originalaj noveloj, 1945); INTER SUDO KAJ NORDO (originalaj noveloj, 1950); SVEDA NOVELARO (tradukoj, 1950); KOKO KRIAS JAM! (originala novelaro, 1955); TIEL OKAZIS AŬ MISTERO MINORA (originala romano, 1958). Li redaktis kvin "RAPSODIOJ" (kolektoj de prozo kaj poezio originala kaj tradukita, 1943). Kunfondinto kaj ĉefredaktoro de *Norda Prismo* (1955-1967). Kunredaktoro de 33 RAKONTOJ (1964).

En 1932 li elmigris en Svedujon.

Li mortis en Boras la 1-an de Decembro 1967 pro cerbohemoragio.

*

Tóth, Vince d-ro (ps. dr.Oth). (1894- ?).

Kunfondinto kaj gvidanto de la *Hungara Esperanto Instituto*, kiu de Septembro 1924 transprenis la eldonon de *Literatura Mondo*.

Li naskiĝis la 22-an de Julio 1894 en Ŝümeg. Doktoro pri juro, polickapitano. Antaŭe li studis teologion.

Esperantisto de 1910. Gvidis E-kursojn ĉe la polico. Fakdelegito de UEA pri filatelo. Kunredaktoro de *Hungara Esperantisto*. Dank' al la protekto de Vince Tóth, la *Hungara Radio* en 1939 aranĝis la unuan E-lingvan disaŭdigon sub titolo "*Danuba Voĉo*". En la serio trifoje prelegis Vince Tóth sub titoloj: *La Subkarpata regiono*; *La hungara popolarto*; *Ciganmuziko kaj la hungaraj popolkantoj*. La ĝenerala jarkunsido de *Hungara Esperanto-Federacio* en 1939 elektis lin en la direktaron.

Li eldonis la dramon poemon de I. Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO en traduko de K. Kalocsay, 1924).

Liaj verkoj: AZ ESZPERANTÓ HIVATALOS SZÓGYÖKEINEK SZÓTÁRA (Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto (en Suplemento K. Kalocsay: *Esperanta vortfarado*, 1923); R. Vámbéry: KRIMINOLOGIO (traduko, 1924).

*

Totsche/Tárkony, Ludoviko/Lajos (ps. Lali Blond). (1902-1978).

Kunredaktoro de *Literatura Mondo* en ĝia dua periodo. Li estis vera edukato de la *Budapeŝta Skolo*.

Li naskiĝis la 29-an de Novembro 1902 en Budapeŝto kiel Totsche. En 1943 li ŝanĝis, t.e. "hungarigis" sian nomon al Tárkony. Li estis financa oficisto. Li esperantiĝis en 1919.

Liaj E-postenoj: en *Hungarlanda Esperanto-Societo*: protokolisto 1924/25, komitatano 1932/38, revizi-komitatano 1947/49. Membro de la *Akademio de Esperanto*.

Li gvidis kelkajn E-kursojn, prelegis aŭ deklamis en literaturaj aranĝaĵoj. Li laboris ĉe la E-dissendoj de la *Hungara Radio*.

Verkista agado:

Samjare de lia esperantistiĝo jam aperis lia noveltraduko en *Hungara Esperantisto*. Li debutis ĉe *Lireratura Mondo* per recenzoj, tradukoj, eseoj. Li estis la unua vera recenzisto, serioza kaj kompetenta juĝanto pri beletraj valoroj. Liaj recenzoj, observoj ĉefe en *Bibliografia Gazeto* kaj *Lingvo-Libro* ankaŭ hodiaŭ povas servi kiel modelo.

Ĉefaj verkoj:

DE PAĜO AL PAĜO (originalaj studoj pri la E-literaturo, 1932); HUNGARA ANTOLOGIO (kontribuo al la proza parto, 1933); Poemoj en DEKDU POETOJ (1934); VOJAĜO EN FAREMIDON de F. Karinthy (tradukitaj noveloj, 1934); Poemoj en ESPERANTA ANTOLOGIO 1958, 1984); LA FLOROJ DE L' MALBONO de Baudelaire (kontribuo, 1957); SOIFO (originala poemaro, 1964).

Distingo: Por la Socialisma Kulturo 1973.

Estas bedaŭrinde, ke samtempe kun la forpaso de Kalocsay, spirite forpasis ankaŭ Tárkony: Li tute rezignis pri la verkado. Korpe li forpasis la 15-an de Julio 1978.

Totsche/Tárkony estis la lasta foriranto el la hungaraj anoj de la *Budapeŝta Skolo*.

*

Varsányi, Paŭlo/Pál (1902-1990).

Redakciano de Septembro 1924.

Li naskiĝis en Budapeŝto la 15-an de Marto 1902. Grafikartisto. Li atingis gravajn sukcesojn en- kaj eksterlande precipe en la ligno- kaj linoleo-gravuraĵo. Li figuris la laborantan homon, pretigis serion pri ministoj, kamparanoj, bestbredistoj. En la tridekaj jaroj lia lignoserio protestis kontraŭ la faŝismo kaj ĉia speco de la subpremo kaj ekspluato. Tiu ĉi serio estis disvastigita en eksterlande kaj rikoltis grandan rekonon. Romain Rolland perletere gratulis lin. La svisa socialista partio uzis lian lignogravuraĵon "Senlaboruloj" en la balotbatalo en 1935. Li estis vera artisto de revolucio.

Dum la milito kune kun aliaj persekutatoj, li devis plenumi t. n. "laborservojn". Hazarde li sukcesis rifuĝi, kaj reveni post la milito en la priirabitan hejmon.

Paŭlo Varsányi esperantiĝis en 1923 kaj samjare li fariĝis arta kunlaboranto de *Literatura Mondo*. Li gvidis en ĝi la konstantan rubrikon "Arto kaj artistoj".

En 1958 en la salonoj de budapeŝta *Ernst-muzeo* oni prezentis liajn kolektitajn kreaĵojn, 212 grafikaĵojn. En 1972 dum la *Hungara Kulturfestivalo* aranĝita ekspozicio oni povis vidi ankaŭ kreaĵojn de Paŭlo Varsányi. Kelkaj el liaj belaj grafikaĵoj estas presitaj en *Literatura Mondo* 1948/99, 101, 116-120; *Norda Prismo* 1958:3, p.189-190; *Hungara Vivo* 1965:3, p. 9-12; 1972:2, p. 19.

Li mortis en Budapest la 20-an de Oktobro 1990.

*

Schwartz/Ŝvarc/Soros, Teodoro/Tivadar d-ro (ps. Teo Melas; <-las>). (1894-1968).
Kunfondinto, ĝis Septembro 1924 eldonisto kaj responda redaktoro de *Literatura Mondo*.

Li estis advokato.

Li esperantiĝis dum la unua mondmilito,²⁷⁴ partoprenis en la E-movado de 1920. Li kontribuis per literaturaĵoj, ĉefe per recenzoj al la revuo.

Liaj ĉefaj verkoj:

MODERNAJ ROBINSONOJ – En la Siberia Praarbaro (rakonto pri la aventuroj de la fuĝintaj militkaptitoj en la fino de la unua mondmilito, 1923/24, premiita dum la IX. *Internaciaj Floraj Ludoj* en Manresa 1923); MASKARADO ĈIRKAŬ LA MORTO – Nazimondo en Hungarujo. Aŭtobiografia romano pri la travivaĵoj en Budapeŝto dum la dua mondmilito (1965; 2-a eldono en 2001, redakto kaj komentario de H: Tonkin). Rusaj komunikiloj anoncis pri apero de ruslingva traduko, bazita ne sur la originalo, sed sur ĝia angla versio.

En 1947 aliĝante al la karavano veturintaj al la 32-a UK en Bern, T. Schwartz kun sia familio definitive forlasis Hungarion.

Li mortis en New York la 22-an de Februaro 1968.

274 Vd p. 38.

*

Waringhien, Gaston (ps. Georgo E. Maura, Georgo Peterido Peneter, Arieĥ ben Guni, A. Nurak, Suzanete R.). (1901-1991).
Ano de la Redakta Komitato en la tria periodo de *Literatura Mondo*.

Licea profesoro pri literaturo. SAT-ano kaj framasono ĝis 1945. En 1942 li estis kondamnita kiel malamiko de Germanio kaj ĝis 1945 estis en la Lubeka lagero.

Li ekkonis Esperanton en 1916. En la tridekaj jaroj li estis jam renoma poeto, tradukisto, instruisto, eseisto, gramatikisto, leksikologo, zamenhofologo, preleganto.

Ĉefaj verkoj:

PLENA VORTARO (kunlaboro, 1930); PARNASA GVIDLIBRO (kun K. Kalocsay, 1932); PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO (kun K. Kalocsay, 1935, 1938, 1958-1964); DUONVOĈE (sub ps. Georgo E. Maura, 1939); LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF (redakto, 1948); LA TRAVESTITA MUZO (sub ps. Georgo Peterido Peneter, 1950); POEMOJ DE OMAR KAJAM (traduko, 1953); ESEJOJ I (beletro, 1956); LA FLOROJ DE L' MALBONO de Baudelaire (traduko kun K. Kalocsay, 1957); GRAND DICTIONNAIRE ESPÉRANTO-FRANCAIS (1957); LINGVO KAJ VIVO (eseoj II, 1959); KANTOJ KAJ ROMANCOJ de H. Heine (traduko kun K. Kalocsay, 1969); PLENA ILUSTRITA VORTARO (1970); NI KAJ ĜI (eseoj III, 1972); LA TROFEOJ de J. M. Heredia (traduko, 1977); Tra la parko de la franca poezio, tradukoj: LA RENESANCA PERIODO (1977); LA KLASIKA PERIODO (1980); LA ROMANTIKA PERIODO (1982); LA MEZEPOKA PERIODO (1984); PLENA ANALIZA GRAMATIKO (1980); KAJ LA SEKVO (eseoj IV, 1980); KAJ LA CETER' — NUR LITERATURO (eseoj V, 1983); LA ROBAĴOJ DE UMAR KAJJAM (traduko, 1984); BELETRO SED NE EL KATEDRO (1987); DEKAMERONO (traduko kun P. Martinelli (1995). Kunfondinto kaj ĉefredaktoro de *La Nica Literatura Revuo* (1955-1962).

De 1963 ĝis 1979 prezidanto de la *Akademio de Esperanto*. Honora membro de UEA. Kunfondinto kaj prezidanto de la *Internacia Komitato por Honoro al K. Kalocsay* 1983-1991).

Li mortis la 20-an de Decembro 1991. Li estas entombigita en malgranda urbeto Aigné.

* * *

13.5 ĈEFAJ LIBROJ ELDONITAJ ĈE LITERATURA MONDO

ANTOLOGIOJ

HUNGARA ANTOLOGIO. Poemoj kaj noveloj de 51 verkistoj.
Tradukis: K. Kalocsay, J. Baghy, K. Bodó, L. Halka. F. Szilágyi, L. Totsche.
Antaŭparolo de K. Kalocsay.
Studo pri la hungara literaturo de M. Babits.
Redaktis K. Kalocsay. Portreto de 47 verkistoj.
La 1-a libro el la serio de AELA en 1933.
1933. 470 p. Vd en la 3-a vol. p. 48-50.

ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO.
Redaktis O. Ginz kaj Stan. Kamarýt.
La 43-a libro eldonita de LM kaj la 8-a vol. de AELA.
1935. 468 p.

SVISA ANTOLOGIO.
Redaktis A. Baur.
La 79-a libro eldonita de LM kaj la 3-a libro de AELA-serio.
1936/1937. 540 p.

*

ORIGINALA POEZIO

J. Baghy: **PRETER LA VIVO.**
1923. 124 p.; 1931. 94 p.

K. Kalocsay: **RIMPORTRETOJ.** Galerio de Esperantaj steloj.
Premio de UEA.
1931. 128 p. Ilustrita. Vd en la 2-a vol. p. 10-12.

K. Kalocsay: **STREĈITA KORDO.**
1931. 189 p. Vd en la 2-a vol. p. 13-16.

Peter Peneter (ps. de K. Kalocsay): **SEKRETAJ SONETOJ.**
Ilustraĵoj de STEBA.
1932. 95 p. Vd en la 2-a vol. p. 17-22.

DEKDU POETOJ.
Redaktis K. Kalocsay.
1934. 126 p. Vd p. 23.

N. Kurzens: **MIA SPEKTRO.**
La 74-a libro eldonita de LM.
1938. 64 p.

EMBA (ps. de I. Baranyai): **EN EKZILO.**
La 75-a libro eldonita de LM.
(Presita en St. Vito al Tagliamento).
1938. 59 p.

K. Kalocsay: **NAŬ POETOJ.**

Redaktis K. Kalocsay.

La 78-a libro eldonita de LM. Presita en 1938, sed pro la militaj jaroj kaj bankroto de LM ĝi ne venis al la legantaro. Eldonita fare de Iltis-Eldonejo en 1989. Vd p. 23.

K. Kalocsay: **IZOLO.**

La 77-a libro eldonita de LM. (Ĝi estis presita en St. Vito al Tagliamento, sed ne bindita, ĉar komenciĝis la dua mondmilito). Laŭ la neaperinta unua eldono, presita en 1939, en faksimila represo eldonis UEA en 1977.

79 p. Vd en la 2-a vol. 23-24.

*

TRADUKITAJ POEMOJ

S. Petőfi: **JOHANO LA BRAVA.** Poemfabelo en versoj.

El la hungara originalo tradukis K. Kalocsay.

Kun kolora reprodukcio de la pentraĵoj de A. Jaschik.

1923. 87 p.

Dua reviziita eldono kun antaŭparolo de K. Kalocsay. Sen ilustraĵoj.

1948. 65 p. Vd en la 3-a vol. p. 37-48.

I. Madách: **LA TRAGEDIO DE L' HOMO.** Drama poemo.

El la hungara originalo tradukis K. Kalocsay.

Kun dudek desegnaĵoj de M. Zichy kaj kun portreto de la aŭtoro.

HEI 1924. 237+XXIV p. Vd en la 3-a vol. p. 43-47.

ETERNA BUKEDO. 260 poemoj de 111 aŭtoroj, el 22 lingvoj.

Tradukis K. Kalocsay.

1931. 352 p. Vd en la 3-a vol. p. 56-57.

J. W. Goethe: **ROMAJ ELEGIOJ; LA TAGLIBRO.**

El la germana tradukis K. Kalocsay.

Ses ilustraĵoj de Stefano Barta.

1932. 80 p. Vd. en la 3-a vol. p. 58-59.

D. Alighieri: **INFERO.** Unua parto de la "Dia Komedio".

El la itala tradukis K. Kalocsay, kun abundaj klarigoj.

Lignogravuraĵoj de D. Fáy.

1933. 289 p. Vd. en la 3-a vol. p. 60-65.

*

ORIGINALA PROZO (romanoj, noveloj)

T. Schwartz: **MODERNAJ ROBINSONOJ.** En la Siberia Praarbaro.

Premiita dum la IX-aj Internaciaj floraj Ludoj en Manresa.

1923. 88 p.

J. Baghy: **VIKTIMOJ.** Pri superhoma sufero de siberiaj militkaptitoj.

Kvara eld. ĉ. 1930. 236 p.

J. Baghy: **HURA!** Ne romano nur grimaco.

1930. 411 p.

F. Szilágyi: **TRANS LA FABELOCEANO**. Noveloj.
1931/32. 135 p.

J. Forge: **MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN**. Romano.
Unua eld. 1931. 244 p. Dua eldono 1934. 244 p.

I. Ŝirjaev: **PEKO DE KAIN**. Novelo.
Premiita en la XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj en 1925.
1932. 35 p.

S. Engholm: **HOMOJ SUR LA TERO**. Romano.
1932. 201 p.

H. Adamson: **AULI**. Rakonto pri knabeto vilaĝa.
La 40-a libro eldonita de LM kaj la sesa libro de AELA en 1934.
1934. 86 p.

K.R. C. Sturmer: **LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO**.
Reviziis K. Kalocsay, L.Totsche, V. Bleier.
1934. 128 p.

S. Engholm: **INFANOJ EN TORENTO**. Skizo.
1934. 114 p.

H. Weinhengst: **TUR STRATO 4**. Romano.
1934. 174 p.

EMBA (ps. de Imre Baranyai): **MARIA KAJ LA GRUPO**. Romano.
La 54-a libro eldonita de LM kaj la 5-a vol. de beletristika serio de AELA en 1935.
1936. 172 p.

I. Lejzerowicz: **EL LA "VERDA BIBLIO" KAJ BABILADO KUN HORAĈO SERĈER**.
La 50-a libro eldonita de LM kaj la 3-a vol. de la beletristika serio de AELA en 1935.
1935. 104 p.

L. N. M. Newell: **BAKŜIS**. Novelaro.
La 73-a libro eldonita de LM.
1938. 149 p.

H. Vallienne: **ĈU LI?** (La unua originala romano en Esperanto).
Stile reviziita kun antaŭparolo de K. Kalocsay.
Presita en Hong Kong 1938. 195 p. Vd p. 41 kaj sur la posta kovrilo.

*

TRADUKITAJ ROMANOJ

Ŝ. Asch: **LA SORĈISTINO EL KASTILIO**. Historia bildo.
El la juda lingvo tradukis I. Lejzerowicz.
1933. 147 p.

J. K. Jerome: **TRI HOMOJ EN BOATO. POR NE FORGESI PRI LA HUNDO.**
El la angla tradukis G. Badash.
1934. 256 p.

R. M. Rilke: **LETEROJ AL JUNA POETO.**
Tradukis A. Münz. Reviziis K. Kalocsay.
1934. 47 p.

B. MUSSOLINI: **VIVO DE ARNALDO.**
El la itala tradukis K. Kalocsay.
1934. 106 p. Vd en la 1-a vol. p. 54, 57; 4-a vol. 51-52.

M. Jelušić: **CEZARO.** Romano.
El la germana kaj kroata tradukis I. Rotkvič.
1934. 533 p.

F. Karinthy: **VOJAĜO EN FAREMIDON kaj DU ŜIPOJ.** (Noveloj).
Tradukis L. Tosche.
1934. 84 p.

A. Munthe: **ROMANO DE SAN MICHELE.**
El la angla tradukis J. Weleminsky.
La 49-a libro eldonita de LM. (AELA-serio).
1935. 511 p. Vd p. 42.

J. Földes: **LA STRATO DE FIŜANTA KATO.** Romano.
El la hungara tradukis L. Halka kaj L. Spierer.
La 56-a libro de LM. (AELA-serio).
1937. 268 p. Vd p. 42.

*

LINGVAJ VERKOJ

K. Kalocsay: **LINGVO, STILO, FORMO.** Lingvaj studoj.
1931. 142 p. Vd en la 5-a vol. p. 59-61; ĉi-libre p. 41.

F. Szilágyi: **LA SIMPLA ESPERANTO.** Kun ilustraĵoj.
1931. 40 p.

K. Kalocsay—G. Waringhien: **PARNASA GVIDLIBRO.** Kiel fariĝi poeto?
1932. 175 p. Vd. en la 5-a vol. p. 62-67.

K. Kalocsay—G. Waringhien: **PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO.** Vorto kaj frazo.
Unua eldono 1935. 372 p. Dua tralaborita eldono 1938. 488 p. Vd. en la 5-a vol. p. 68-74.

E. Wüster: **KONTUROJ DE LA LINGVONORMIGO EN LA TEKNIKO.**
El la germana originalo esperantigis E. Pfeffer.
1936. 13 p.

V. Tóth: **AZ ESZPERANTÓ HIVATALOS SZÓGYÖKEINEK SZÓTÁRA.** (Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto). Ene pri la vortfarado K. Kalocsay.
4-a eldono 1937. 131 p.

H. Seppik: **LA TUTA ESPERANTO**. Gramatiko por progresantoj.
1938. 181 p.

K. Kalocsay: **LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ**. Teorio kaj praktiko.
1938. 20 p.

L. Kökény: **POPULARA LERNOLIBRO DE ESPERANTO**. (Internacia gramatiko por komencantoj).
1947. 64 p.

K. Kalocsay: **ESZPERANTÓ NYELVTAN**. Klarigoj al la libro de L. Kökény: **POPULARA LERNOLIBRO DE ESPERANTO**.
1948. 40 p.

*

BELARTAJ VERKOJ

I. Genthon: **LA PENTROARTO EN LA MALNOVA HUNGARUJO**.
Tradukis F. Szilágyi.
1932. 72 p.

S. Grenkamp-Kornfeld kunlabore kun J. Brzekowski: **PRI LA MODERNA ARTO**.
1933. 29 p.

A. Hekler: **ARTHISTORIO I**. La Esperanto-eldonon prilaboris A. Kampis.
Tradukis K. Kalocsay.
1934. 104 p. teksto + 112 bildopaĝoj. Vd en la 4-a vol. p. 49-50.

*

DIVERSAJ LIBROJ

Kenelm Robinson (ps. de K. R. C. Sturmer). **HOMARISMA LABORO**. Unuaktaĵo.
1931. 31 p.

MAGYAR ESZPERANTÓ ÉVKÖNYV.

Redaktis L. Kökény.
I. évf. 1930. 32 p.; II. évf. 1931. 32 p.; III. évf. 1932. 16 p.

L. Totsche: **DE PAĜO AL PAĜO**. Esearo. Literaturaj profiloj.
1932. 120 p.

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO. Iniciatinto de I. Ŝirjaev.
Redaktis L. Kökény—V. Bleier, la lingvofakon K. Kalocsay.
1933-1934. Du vol. 600 p. + 184 bildopaĝoj. (AELA-serio).

E. Aisberg: **FINE MI KOMPRENAS LA RADION**.
1934. 140 p. + 45 bildoj.

A. Slonimski: **MIA VOJAĜO EN SOVETIO.**
El la pola originalo tradukis S. Grenkamp-Kornfeld.
1934. 142 p.

T. Herzl: **LA JUDA ŜTATO.** Provo de moderna solvo de la juda problemo.
El la germana originalo tradukis B. Selzer. Esperanta antŭparolo de E. Pfeffer.
1934. 139 p.

K. Kikuĉi: **AMO DE TOOĴUUROO KAJ DU ALIAJ TEATRAĴOJ.**
El la japana tradukis joŝiŝi Ŝimomura.
1934. 88 p.

VERKOJ de FeZ. Plena verkaro de Dro Felikso Zamenhof.
Redaktis E. Wiesenfeld.
La 51-a libro eldonita de LM kaj la 4-a vol. de la literatura serio de AELA en 1935.
1935. 271 p.

E. Privat: **INTERPOPOLA KONDUTO.**
La 46-a libro eldonita de LM, kaj la 1-a vol. de la arto-sciencia serio de AELA.
1935. 154 p.

Loon, H. van: **RIGARDU LA TERON.**
El la angla originalo tradukis G. Savila.
1936. 480 p. kun ilustraĵoj.

ARĜENTA DUOPO. Jubilea libro pri J. Baghy kaj K. Kalocsay okaze de iliaj 25-jara esperantistiĝo. Redaktis V. Bleier kaj F. Szilágyi.
1937. Du volumoj. 37 p. + 34 p. muziknoj.

UZITAJ MALLONGIGOJ

AD	ARĜENTA DUOPO. Vd p. 64.
BI	Budapeŝta Informilo
BrE	Brita Esperantisto, La
DB	Debrecena Bulteno
EA/1	ESPERANTA ANTOLOGIO. Poemoj 1887-1957. Red. W. Auld. La Laguna: J. Régulo, 1958. 641 p.
EA/2	ESPERANTA ANTOLOGIO. Poemoj 1887-1981. Red. W. Auld. Rotterdam: UEA, 1984. 12+888 p.
EdE	ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO. Vd p. 64.
EM	Eszperantó Magazin
ENKONDUKO	ENKONDUKO EN LA ORIGINALAN LITERATURON DE ESPERANTO. W. Auld. Saarbrücken: A. E. Iltis, 1979. 101 p.
GVIDLIBRO II	GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. Skizo de historio kaj literaturo de Esperanto. Red. A. Pechán. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1964. 190 p.
HA	HUNGARA ANTOLOGIO. Vd p. 59.
HdE	Heroldo de Esperanto
HE	Hungara Esperantisto
HEA	Hungara Esperanto-Asocio
HEI	Hungara Esperanto-Instituto
HES	Hungarlanda Esperanto-Societo
HESL	Hungaria Esperantista Societo Laborista
HFM	Hungara Fervojista Mondo
HH	Hungara Heroldo
HV	Hungara Vivo
IF	Iltis-Forumo
KAJ LA CETER'	KAJ LA CETER'... NUR LITERATURO. Eseoj. G. Waringhien. Antwerpen/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 350 p.
KPr	KVAR PRELEGOJ PRI ESPERANTA LITERATURO. D. Kralj. Lubjana: Eldona Sekcio de Slovena Esperanto- Ligo, 1960. 188 p.
LF	Literatura Foiro
LL	Lingvo-Libro
LM	Literatura Mondo
MEM	Mondpaca Esperantista Movado
NAER	North American Esperanto Review, The
NE	Nederlanda Esperantisto
NE NUR	NE NUR LETEROJ DE PLUMAMIKOJ. M. Boulton. Malmö: Eldona Societo-Esperanto. 1984. 64 p.
NLR	Nica Literatura Revuo, La
NP	Norda Prismo
OL	ORA LIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO. (1887-1937). Red. V. Bleier kaj E. Cense. Warsawa: Loka Kongresa Komitato de la XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto, 1937. 221 p.
OR	Okcidentgermana Revuo
TBE	The British Esperantist

SKIZO

SKIZO PRI LA ESPERANTA LITERATURO V.
Novobilský. Opava: Esperanto-Junulara Literaturo ĉe
Domo de Kulturo, 1956. 74 p.

*

INDEKSO DE PERSONOJ

En tiu ĉi indekso la nomoj estas ordigitaj laŭ la simplaj literoj de la Esperanta kaj latina alfabetoj, sen konsidero pri nacilingvaj supersignoj.

Abonyi, Á.....	54
Adamson, H.	14, 15-16, 23, 24, 33, 61
Aisberg, E.	64
Alighieri, D.....	52, 60
Applebaum, J. D.	29
Áprily, L.	17
Asch, S.....	62
Auld, W.	12, 14, 15, 25, 34, 36-37, 42, 65
Babits, M.....	23, 50-51, 59
Badash, G.....	62
Baghy, Gy. (Patro de J. Baghy).....	45
Baghy, J.	23, 26, 27-30, 33, 35, 36, 38, 40, 44, 45, 48, 59, 61, 64
Balbin, J.	43
Balkányi, M.....	46
Balkányi, P.	26, 36, 39, 44, 46-47
Barabás, Á.	53
Barta, S.	29, 32
Bartók, F.	40
Baudelaire, Ch.	52, 56, 58.
Baudin-Vatré, J.	23
Baur, A.	59
Bayer, A.	26, 38, 47
Behrendt, A.	29
Belmont, L. (ps. de L. Blumenthal)	9-10, 13
Benczik, V.	23, 24, 37
Bénik, Gy.	41, 48
Benkő, I.....	46
Bennemann, P.	29
Benyó, M.....	52
Berceli, B,	23-24, 33, 42, 44/a, 48-49
Bérci, D.	37
Beraru, M.	29
Berger, J.	29
Bernard, R.....	34, 53
Blassberg, M.	29
Bleier, V.	23, 28-29, 31, 33, 35, 37, 39, 40-43, 44/a, 48-50, 61, 64, 66
Bicknell, C.	10, 13
Bodó, K.	3-4, 19-20, 23, 27-28, 40, 44/a, 48, 50-51, 59
Bodroghy, M.....	45
Botos, I.....	24
Boulton, M.....	37, 66
Braun, F.	35, 41, 43
Braun, S. Z.	10, 12, 26
Briggs, L.....	26

Brzekowski, J.	63
Capp, C. D. A.	36
Cart, T.	54
Cense, E.	66
Clark, B.	34
Cseh, A.	45, 55
Čulitis, M.	23-24
Daniellisz, R.	55
Degenkamp, G. J.	36
Dinwoodie, J. S.	34
Domčnech-i-Mas, A.	10
Dratwer, I.	10-13
Dresen, Helmi	15, 26, 29, 33, 42
Dresen, Hilda	14, 16, 23, 25, 26, 29, 42
Eichenbaums, R.	29
Emba (ps. de I. Baranyai)	14, 60-61
Engholm, S.	29, 61
Eriksson	41
Erošenko, V. J.	9-10
Ertl, I.	37
Eyquem, D.	26
Fajsz, K.	37
Falkonbrîg, G.	23
Fáy, D.	60
Fejes, M.	37
Firu, P.	29
Földes, J.	42, 62
Forge, J. (ps. de J. Fethke)	29, 61
Fruictier, P.	54
Gárdonyi, G.	47, 53
Genthon, I.	63
Gergely, M.	8, 18, 40
Ginz, O.	59
Goethe, J. W.	52, 60
Golden, B.	37
Grau-Casas, J.	10, 26
Grenkamp-Kornfeld, S.	9, 29, 63-64
Gulyás, I.	37
Halka, L. (ps.: Parvus Pistic)	2, 23, 42, 59, 62
Hankel, M.	9-12, 16, 20
Hauptenthal, R.	24-25.
Heine, H.	52, 58
Hekler, A.	35, 53, 63
Heltai, E.	47, 53
Herczeg, F.	47
Heredia, J. M.	58
Hertzl, T.	64
Hevesi, E.	26, 51
Hitler, A.	41
Hohlov, N.	26, 42
Hovorka, N.	23, 29
Hromada, R.	26, 29

Iltis, A. E.....	24, 65
Imbán, K.....	17
Inglada-Ors, V.....	10
Ito saburo (ps.: I. U.)	10, 12, 13
Jaschik, Á.	60
Jelušič, M.	62
Jerome, J. K.	62
Jevsejeva, L.	23
Johnson, W. B.....	51
József, A.	7
Jung, T.	29
Jurysta, I.	26, 29
Kalocsay, K. d-ro (patro de Kolomano)	52
Kamačo, G.	24
Kamarýt, S.	26, 29, 59
Kampis, A.....	63
Kapitány, L.	40
Karczag, G.	22
Karinthy, F.....	20, 29, 47, 50-51, 53, 56
Karolczyk, S.	9
Kikuči kan	64
Knutsson, E.....	29
Kofman, A.	9, 10
Kökény, L.	23, 37, 63-64
Korínek, J.....	34
Kosztolányi, D.	7, 50
Kozłowski, C. J.....	10, 12, 16
Kralj, D.	23-24, 36, 66
Krestanov, I.....	26
Kun, B.	46
Kurzens, N.	23, 59
Lejzerowicz, I.	29, 33, 61
Lengyel, P.	26, 44, 53-54
Lippmann, W.....	29
Logvin, A.	10, 13
Loon, H. van.....	64
Lukáš, M.	29
Madách, I.	40, 52, 55, 60
Makai, E.	47, 53
Mangada-Rosenörn, J.....	10
Marich, A.....	46
Martinelli, P.	58
Mátéffy, J.	18
Maura, G. E. (ps. de G. Waringhien)	23, 58
Mazzolini, A.	26, 29
Miñalski, E.....	9
Morariu, T.....	26, 29
Móricz, Zs.....	50
Münz, A.....	62
Munthe, A.....	42, 62
Mussolini, B.....	62
Myslik, K.....	10

Nagy, I. d-ro	21
Neilande, S.	24
Newell, L. N. M.....	23, 29, 61
Novobilský V.	37, 66
Núñez-Dubús, A.....	23
Nylén, P.	26, 29, 53-54
Ojalo, J.....	14, 15, 24, 25
Osmond, E.	26
Panda, J.....	52
Parvus Piscis (ps. de L. Halka)	29
Pechán, A.	65
Petőfi, S.	49, 52, 60
Pfeffer, E.	9, 13, 63
Píĉ, K.	24, 34
Polgár, V.	54
Price-Heywood, B.	23
Privat, E.	10, 64
Pumpr, T.	34
Rácz Kövesd, B.....	27
Régulo-Pérez, J.	10, 15, 24
Rilke, R. M.....	62
Robinson, K. (ps. de K. R. C. Sturmer)	29, 64
Rolland, R.	56
Rossetti, R.	14, 25, 34, 37, 42
Rotkviĉ, I.	62
Sánta, F.	24
Sárosi/y, M.	45
Saville, G.....	64
Schauhuber, A.	23
Schoor, J. van	10, 12, 26, 29
Schulhof, S.	9-10
Schwartz, R.....	26, 29
Schwarz/Švarc/Soros, T.....	26, 37, 38, 40, 57, 61
Selzer, B.	64
Seper, K.	54
Seppik, H.	14, 25, 26, 29, 63
Shakespeare, W.....	52
Silfer, G.	37
Slonimski, A.	64
Solovjev,.....	26
Somlai/Spierer, L.....	24, 42
Soros, G.....	35
Sproeck, A.	12-13
STEBA (ps. de S. Barta)	29, 32, 59
Stillman, E. C.	23
Stojan, P. E.	26
Strümpfel, M.....	23
Sturmer, K. R. C. (ps.: K. Robinson)	23, 61
Su, A.	23
Sutkovej, V. G,	10, 23
Szathmári, S.....	2

Szilágyi, F.....	3-5, 23, 28, 33, 36, 40, 44/a, 48, 55, 59, 61, 63, 64
Szelvényi, F.....	52
Swietoszewski, R.	23
Ŝapiro, J.....	33
Ŝimomura joŝiŝi.....	64
Ŝirjaev, I. G.	61, 64
Tárkony/Totsche, L.	15, 24, 30, 33, 37, 40
Thomson, A. W.	2
Thorsen, P.	34
Tonkin, H.....	57
Tóth V. d-ro	26, 40, 55, 63
Totsche/Tárkony, L.	22, 23, 56, 44/a
Vámbéry, R.	56
Vallienne, H.....	35, 41, 62
Vanĉik, B.....	34
Vangel, M.....	52
Varsányi, P.....	26-27, 44, 56-57
Vatré, H.....	36-37, 42
Venture, A.	42
Waringhien, G.	23-24, 29-30, 33, 35, 36, 42, 44/a, 52-53, 57, 63, 66
Weinhengst, H.....	61
Weleminsky, J.	62
Wiesenfeld, E.	29, 33, 64
Wüster, E.	63
Zahariew, Z.	29
Zamenhof, F. (ps.: FeZ)	29, 64
Zamenhof, L. L.....	9, 42, 52, 54
Zamenhof, Leono	26, 29
Zamenhof, Lidja	29, 33, 42
Zanoni (ps. de F. Pillath)	26
Zee, Saint-J.....	23
Zichy, M.....	60
Zsiros, E.....	45

ENHAVO

ĈAPITRO 12-13 KALOCSAY LA REDAKTORO LITERATURA MONDO — BUDAPEŝTA SKOLO

ANTAŬPAROLOJ

12.1	ENKONDUKO.....	1
12.2	Lia redaktora metodo	2
12.2.1	Lingva revizianto ĉe Hungara Vivo.....	6
12.3	SENEKZEMPLE AŬDACA ENTREPRENO.....	9
	<i>Post la unua kongreso</i> (poemo de Maria Hankel)	11
12.4	PRI LA POEMTRALABORO DE KALOCSAY.....	14
12.4.1	Pri la polurita VESPERKANTO de H. Adamson.....	14
12.4.1.1	Defende al Hendrik Adamson (H. Dresen J. Ojalo, H. Seppik)	14
12.4.1.2	Ankoraŭfoje pri la "Vesperkanto" de Adamson (Letero de H. Dresen).....	15
	<i>Arboj karbiĝis</i> (poemo de H. Adamson)	16
12.5	Du tradukoj de la poemo <i>Marto</i> (trad. de Imbán–Kalocsay)	17
12.6	"Ribelo" ĉe Hungara Vivo.....	18
12.7	Kiu estis la tradukinto?	19
12.8	La literatura pretendemo de Kalocsay (D-ro I. Nagy)	21
12.9	Ĉe la juĝisto (G. Karczag)	22
12.10	Libroj redaktitaj de Kalocsay	23
13	LITERATURA MONDO — BUDAPEŝTA SKOLO	
13.1	Skizaj indikoj pri la revuo kaj eldonejo	26
13.1.1	Esenca bibliografio.....	36
13.1.1.0	Notoj kaj referencoj	37
13.2	Rememoroj pri la naskiĝo de Literatura Mondo (P. Balkányi)	38
13.3	Kalocsay rakontas.....	40
	<i>Al la Budapeŝta Skolo</i> (Poemo de J. Balbin)	43
	La stabo de Literatura Mondo (portretoj).....	44
13.4	Bio-bibliografiaj notoj de la stabo de Literatura Mondo	45
13.5	Ĉefaj libroj eldonitaj ĉe Literatura Mondo	59
	UZITAJ MALLONGIGOJ.....	65
	INDEKSO DE PERSONOJ	67
	ENHAVO	72

ANTAŬPAROLO Al la sesa volumo

Antaŭ 70 jaroj fenikse renaskiĝis *Literatura Mondo*.

Ĉi tiu volumo estas dediĉita al la redaktoro Kalocsay kaj al la fama revuo, kies redaktora stabo, kune kun la elita kunlaborantaro multe kontribuis al la evoluo de Esperanto, perfektigo de literatura stilo.

Ĝis nun aperintaj volumoj de OMAĜE:

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO. Ampleksa biografia kompilaĵo. Kun fotoj, desegnaĵoj, reproduktaĵoj. 1998. 143 p.

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO. Prezento de Kalocsay la poeto. Kun alfabeto indekso de ĉiuj liaj poemoj kaj tradukoj al diversaj lingvoj kun aperfontoj kaj klarigaj piednotoj. 1999. 110 p.

TRADUKINTO DE LA INTERNACIA LINGVO. Prezento de KALOCSAY KIEL POEM-TRADUKANTO. Ampleksa bibliografia kompilaĵo. 2000. 153 p.

LA PROZA VERKISTO KAJ TRADUKINTO. Liaj prozaj verkoj kaj tradukoj estas listigitaj en alfabeto ordo. 2000. 75 p.

LA LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO. Historio de la diskutoj pri *neologismo*, ĝusta uzado de la *pasivaj participoj*, la *Esperanta vortfarado* ktp. kun multaj indikoj kaj citaĵoj. 2001. 112 p.

La aplikata dekuma sistemo en ĉiuj volumoj estas samaj. Por gardi la kontinuecon la piednotoj estas numeritaj sinsekve sen interrompo.

Budapest 2001

Ada CSISZÁR